

HUGO RÖLLINGER

MONUMENTE PRI ESPERANTO



ILUSTRITA DOKUMENTARO PRI
1044 ZAMENHOF/ESPERANTO-
OBJEKTOJ EN 54 LANDOJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

MONUMENTE PRI ESPERANTO

HUGO RÖLLINGER

MONUMENTE PRI ESPERANTO

Ilustrita Dokumentaro pri
1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj
en 54 Landoj de la 5 Kontinentoj

*Cent jaroj da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj,
tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj k.a. 1896-1996*

Universala Esperanto-Asocio
Rotterdam 1997

La eldonon de tiu ĉi libro subtenis FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj, Institucio Hodler '68, s-ro Adamo Goralski Pawlikovski, kaj s-ro Heinz Schindler. La aŭtoro kaj la eldonejo kore dankas!

Redaktita de Thomas Bormann

ISBN 92 9017 051 4

© Universala Esperanto-Asocio 1997

Nieuwe Binnenweg 176

NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Komposta en la Centra Oficejo de UEA


Presita ĉe Drukkerij Bariet bv, Nederlando

ENHAVO

Antaŭparolo	7
Fiera bilanco	8
Difino de la esprimo “Zamenhof/Esperanto-Objekto” (ZEO)	10
La landoj kun la plej multaj objektoj	11
La kulminoj inter la Zamenhof/Esperanto-Objektoj	11
Tabela resumo pri la 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj en 54 landoj	12
Tabela resumo pri la inaŭguroj de Zamenhof/Esperanto-Objektoj laŭ jaroj ...	13
Listo de la 1044 objektoj	14
Ŝipoj oficiale nomumitaj “Esperanto” kaj “Zamenhof”	80
Limoges, Terrassa aŭ Sabadell? Kiu urbo unafoje nomis straton?	83
La unua Zamenhof-monumento	86
La “forgesita Esperanto-ŝtono” en Narvik, Norvegio	89
La Esperanto-monumento en Den Burg, Nederlando	94
Objektoj en la kosmo — kiam “Zamenhof” renkontos “Esperanton”?	96
La Zamenhof-monumento en Ostrava — la du-urba monumento	98
La “renaskiĝo” de monumento en Brazilo	100
“Esperanto jes, Zamenhof ne!” — Esperanto-strato en Girona	101
La hispana milito kaj la “Strato de l’ esperantisto Hernández Lahuerta” ...	102
Unika metodo “konkeri” Esperanto-Avenuon	103
Kiel inaŭguri Zamenhof/Esperanto-Objekton?	106
Tabela resumo pri cent jaroj da Zamenhof/Esperanto-Objektoj	107
Literaturaj fontoj	109
Listo de la fotintoj	109
Biografiro de la aŭtoro	110

*En niaj koroj, granda homo
stariĝas viaj monumentoj.
La gloron de l' benata nomo
ripetos ĉiuj la jarcentoj!*

LEO BELMONT, ĉe la tombo de Zamenhof



Zamenhof-busto en la urba muzeo de Stoke-on-Trent, Britio

ANTAŪPAROLO

Origine, t.e. dum la unua duono de la 30 jaroj de mia kompilado, mi nur intencis daŭrigi la registradon de Zamenhof/Esperanto-Objektoj en formo de nuraj tekstaj listoj kiajn ĝis 1964 publikigis Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) de UEA cele al varba kaj instiga informado. Kune kun informoj pri ne jam registritaj aŭ nove inaŭguritaj objektoj mi ricevis tiom bonajn fotojn, ke ne estus ĝentile simple ilin ignori. Tute male — tiuj unikaj kaj historie valoraj fotoj fariĝis integra parto de la Dokumentaro.

La Dokumentaro entenas multajn ĝis nun ne publikigitajn faktojn pri pluraj rimarkindaj objektoj:

- la evidente unua Zamenhof/Esperanto-Objekto inter ĉiuj aliaj — laŭ ĝisnunaj esploroj — estas la ŝipo “Esperanto”, konstruita kaj ennavigaciita antaŭ precize cent jaroj, en 1896 en Hispanio, do nur naŭ jarojn post apero de Esperanto;
- la plej frua intenco nomi “Zamenhof-straton” en Limoges, Francio, en la jaro 1907 (fakta nomigo de strato tie okazis supozeble en 1912);
- la unuaj “Zamenhof-placo” kaj “Zamenhof-bulvardo” en Terrassa kaj Sabadell, Hispanio, en la jaro 1912;
- la unua Zamenhof-monumento inaŭgurita en 1914 en Franzensbad, Aŭstro-hungara Imperio, nun Františkovy Lázně, Ĉehio;
- la dum jardekoj forgesita kaj samtempe plej norda monumento, la Esperanto-stono en Narvik, Norvegio, el 1934, kiu estis detruita per bombo dum la milito kaj nove aranĝita en 1980.

Resume: CED de UEA en 1965 publikigis liston kun 291 objektoj en 25 landoj; tiu ĉi Dokumentaro aktualigas tiun liston kaj etendigas ĝin al 1044 objektoj en 54 landoj, riĉe ilustrite per fotoj, grafikaĵoj kaj statistikoj.

Ĉion ĉi kolekti per korespondado kaj enketi en 5 kontinentoj kaj prilabori ĝin al prespresa formo zorgeme atentante sennombrajn fremdlingvajn datumojn kaj nuancojn, ne estus eble sen la aktiva subteno fare de multaj informantoj el nia “diligenta kolegaro”. Diverskontinentaj gesamideanoj aŭ detale respondis al miaj demandoj aŭ sendis de si mem valorajn kontribuojn el siaj urbo aŭ regiono. Aparte valora estis la subteno fare de *Heroldo de Esperanto*, kiu ripete atentigis varbe pri la evoluo kaj pri la nombra stato de la enketado, poste la Jarlibro de UEA antaŭanonicis la eldonon de la Dokumentaro.

Ĉio ĉi kaŭzis, ke esperantistoj sendis al mi siajn proprajn jam komencitajn listojn de Zamenhof/Esperanto-Objektoj kaj ke ĉirkaŭ 20 gesamideanoj sendis al mi fotojn kaj informojn pri objektoj vuditaj dum ferioj en fremdaj landoj.

Por eldonigi tiun ĉi Dokumentaron multe da tempo kaj fakaj spertoj dediĉis Thomas Bormann, komisiito de UEA pri Esperanto-Dokumentoj. Aparte, dum jaroj, helpis al mi sindone Raymond Boré el Chambéry, Francio, intertempe fakdelegito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-Objektoj. Al ĉiuj kunlaborintoj mi profunde kaj sincere dankas!

Hugo Röllinger
Honora Membro de UEA kaj GEA
Januaro 1997

MOTO DE LA AÜTORO:

*Jena kompilaĵo reprezentu simbolan monumenton,
starigotan honore al tiuj plejparte anomimaj pioniroj
de la internacia lingvo, kiuj antaŭ pli ol cent jaroj
komencis, ĉiuj laŭ propraj impulsoj, krei tiun imponan
rezulton — tute ne definitivan.*

FIERA BILANCO

“Progreso por la mondo estas nur tio, kion oni povas reale montri al ĝi” — jen malpli konata eldiro de d-ro Zamenhof.

Pri tiu devizo mallongan retrorigardon. La Unuiĝintaj Nacioj (UN) proklamis la jaron 1963 “Jaro de Internacia Kunlaboro”. UEA kunlaboris en diversaj agadoj de UN por tiu celo, speciale dediĉinte sian atenton al la lingva problemo. Laŭ perfekta laborplano de la UEA-prezidanto prof. Lapenna, UEA evoluigis grandegan kampanjon sur niveloj internacia, landa kaj loka, kiun partoprenis centoj da Esperanto-organizaĵoj kaj miloj da unuopuloj.

Rezulto: ĉ. unu miliono da individuaj subskriboj el 74 landoj, kaj de pli ol 4000 organizaĵoj kun ĉ. 73 milionoj da membroj, pledantaj por la internacia lingvo, Esperanto. Ĉio-ĉi ne nur por — laŭ Zamenhof — ĝin “montri al la mondo”, sed eĉ por oficiale transdoni ĝin dokumente al UN.

Evidente montras tiu unika rezulto, kiom da energio kaj iniciatoj povas esti mobilizataj interne de l’ Esperanto-”komunumo”, ĉar — la entrepreno estis organizita.

Ĉu adekvataj sukcesoj interne de l’ esperantismo estas konstateblaj sen organizita “laborplano”?

Nu: en 1887 iu “D-ro Esperanto” publikigis senpretendan, modestan broŝuron sub la titolo “Lingvo Internacia”.

Jam 20 jarojn poste, en 1907, la Esperanto-grupo en Limoges, Francio, klopopidis pri Zamenhof-strato en sia urbo, petinte por tio eĉ la permeson de d-ro Zamenhof per letero de la 16-a de februaro 1907, kiu estis respondita pozitive la 25-an de februaro 1907; tamen la inaŭguro prokrastiĝis — laŭ ĝisnunaj konoj ĝis 1912.

Efektive, laŭ revuo *Esperanto* de UEA de septembro 1912:

Al la Katalunaj urboj, Terrassa kaj Sabadell, apartenas la honoro, ke ili la unuaj donis la nomon Zamenhof al unu el siaj placoj kaj stratoj. La urbo Terrassa, kiu estas kvazaŭ la industria brako de Barcelono, nomis “Placon de Doktoro Zamenhof”. Ĝi estas la unua urba vojo, kiu glorigas nian movadon, glorigante ĝian estron. La urbestro de Terrassa, S-ro Ulles oficiale komunikis la decidon al D-ro Zamenhof per Esperanto. En Sabadell larga nova strato havos la nomon de nia majstro. En la du diritaj urboj okazis ceremonio kaj festo por la inaŭguro de la nomtabulo.

Fiero kaj entuziasmo sentiĝas el tiuj linioj el 1912 en la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Sekvis Esperanto-strato, en 1913, en Brazilo (Realengo/Rio de Janeiro); en 1914 denove du en Hispanio kaj unu en Ĉehio, ktp. La Jarlibro de UEA por 1930 nomas 12 tiajn objektojn en 9 landoj. Ĝis 1965 tio kreskis al 291 objektoj en 25 landoj (laŭ la tiama listo de CED de UEA); mia unua listo, publikigita en *Heroldo de Esperanto* de 1984, listigis 459 objektojn en 29 landoj; en mia kontribuo por *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo* aperis 677 objektoj el 34 landoj; ĝis 1996 tiu sumo kreskis al 1044 objektoj en 54 landoj.

Do — grandioza altiĝo de la nombro de la objektoj, parte nove inaŭguritaj helpe de la listo en *Heroldo*, parte ĝis tiam nenie registritaj.

Nur dum la 8 monatoj inter la unua publikigo la 30-an de marto 1985 en *Heroldo*, subtenate per informoj fare de UEA-Jarlibro, al la kompilanto rulis lavango da aprobab, ja eĉ ekstreme laŭdaj leteroj, da informoj, kompletigoj kaj korektoj — kvazaŭ por plenigi ĝis nun sentitan vakuon.

Krome aldoniĝis informoj pri aparte interesaj objektoj, nome: en 1936 kaj 1938 du kosmaj objektoj, asteroidoj cirkulantaj inter la orbitoj de la planedo Marso kaj Jupitero, kiuj estas officiale nomitaj kaj registritaj sub la nomoj "Esperanto" resp. "Zamenhof". Kaj en 1977 la usona spac-kompanio NASA lanĉis spacveturilon kun sondisko inter alie en Esperanto, destinita por fremdaj galaksioj.

Nu — ĉio ĉi okazis sen iu ajn laborplano aŭ direktivo. Sennombraj privataj personoj unuope aktivis, kaj jen la konstatebla fenomeno: centoj da urbaj komunumoj kaj magistratoj, da provincaj kaj kantonaj administracioj kaj institucioj kaj eĉ ŝtataj instancoj kaptis la okazon, utiligis la prezentitan ŝancon, sekvis donitajn ekzemplojn, identigi kun la ideo, sin envicigi en tiun — komence maldensan — aron de "pacaj batalantoj" por homa universaleco, por interpopola solidareco kaj reciproka kompreniĝo.

Kaj la konkreta rezulto? De sur dekmiloj da domoj, de sur granitaj monumentoj, ĉe urbaj placoj kaj parkoj, de sur bronzaj tabuloj, oficialaj surskriboj informas tutmonde la homojn kaj atestas: Zamenhof kaj la lingvo Esperanto estas inter ili.

El la konsidero, ke ĉio ĉi okazis laŭ individuaj iniciatoj, sen iu ajn organizita centra influo, evidentiĝas la certe per tio pravigita konkludo, ke la esperantismo estas pli ol nura afero de iu "Esperanto-komunumo", sed ke ĝi implicas tutsimple la senton pri humanismo, ke ĝi reprezentas vast-etende la konscion pri la nepraprofita, ke la homa socio fine venku la lingvajn barojn inter la popoloj per neŭtrala supernacieca komunikilo. Aldone, sed tamen lige kun la pritraktita temo, nur tri faktoroj estu cititaj, kiuj konformas al tiu rolo de la esperantismo:

Kreskis konsiderinde la nombro de universitatoj en la mondo, kiuj enkondukis Esperanton en siajn studplanojn; aparte de Esperanto-stratoj kaj -placoj estas menciiindaj dekoj da poštmarkoj kun Esperanto-motivo eldonitaj en pli ol 10 landoj; Unesco aprezis la Jubilean Jaron de Esperanto 1987 per mencio de "La centa datreveno de la kreo de la Internacia Lingvo Esperanto" en la listo de grandaj personecoj kaj historiaj eventoj.

El ĉio ĉi, resume, evidentiĝas ke la esenco de la esperantismo tiom serioze mondskale enradikiĝis en la konscio de la civilizita homaro, ke ĝi okupas tiom firman popularan pozicion en plej diversaj medioj, ĉu edukaj, ĉu kulturaj aŭ etikaj, ke ĝi fariĝis socia fakto nepretervidebla en nia moderna mondkoncepto.

DIFINO DE LA ESPRIMO “ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTO” (ZEO)

En tiu ĉi katalogo ZEOj estas

- stratoj, avenuoj, placoj, parkoj ktp. oficiale nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto. Tiuj nomoj en ĉiu kazo devas regule aperi sur strattabuloj, mapoj kaj simile
- konstruaĵoj oficiale nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto, ekzemple monumentoj, pontoj, kulturdomoj, memortabuloj, muzeoj ktp.
- komercaj entreprenoj, firmaoj, klinikoj, restoracioj, hoteloj ktp. nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto, sed kondiĉe ke tiu nomigo ne estas ligita al situo en strato aŭ avenuo samnoma. (Ekzemple, “hotelo Esperanto” en “Esperantostrato” ne estas ZEO, sed “lernejo Esperanto” en “avenuo X” estas ZEO.)
- objektoj oficiale nomitaj laŭ personoj, kies meritoj ekskluzive aŭ almenaŭ plejparte rilatas al esperantismo, la enskribo de la objekto devas mencii la vortojn “Esperanto” aŭ “Zamenhof”. (Ekzemple validas kiel ZEO la memortabulo pri la iama urbestro de la itala urbo Trento, Peterlongo, ĉar la tabulo mencias la Esperantajn meritojn de Peterlongo, nome ke li tradukis la “Dian Komedion” de Dante el la arkaika itala lingvo al Esperanto.)
- objektoj oficiale nomitaj laŭ personoj ĉe kiuj la esenca motivo por la honorigo estis la esperantisteco (tio validas ĝis nun ekskluzive por la “Plaza Doctor Juan Régulo Pérez” en La Laguna, Tenerife, Hispanio)



Bourges, Francio

LA LANDOJ KUN LA PLEJ MULTAJ OBJEKTOJ

I. Absoluta sinsekvo

1	Brazilo	161	5	Hungario	74	9	Nederlando	47
2	Francio	133	6	Hispanio	73	10	Aŭstrio	26
3	Pollando	107	7	Bulgario	68	11	Ĉeĥa Resp.	26
4	Italio	82	8	Germanio	62	12	Israelo	22

II. Relativa sinsekvo

Proporcio al la *nombro da enlogantoj* en la unuopaj landoj, la sinsekvo kaj aspekto estas tute aliaj, pli “justaj”.

Rezultiĝas 1-e Bulgario: 7,56 obj./ 1 miliono enl.
2-e Israelo: 7,33 obj./ 1 miliono enl.
3-e Hungario: 6,72 obj./ 1 miliono enl.
ktp ĝis Usono: 0,003 obj./ 1 miliono enl.

LA KULMINOJ INTER LA ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTOJ

La plej alta objekto:

Zamenhof-monumento en Sabadell, Hispanio, el 1989; alteco: 12 m.

La plej longa objekto:

La plej longa Esperanto-strato troviĝas en São Sebastião do Cai (Brazilo). Longeco: 4 kilometroj.

La plej nordaj objektoj:

1e: Memoriga Esperanto-monumento en Narvik, Norvegio, $68^{\circ}25'$ norda latitudo
2e: “Esperanto-Rivereto” en Alaska, Usono, $63^{\circ}27'$ norda latitudo

La plej sudaj objektoj:

1e: Esperanto-arbo, Tasmanio, Aŭstralio, 42° suda latitudo
2e: Zamenhof-monumento kaj Esperanto-strato, Mar del Plata, Argentino
3e: Zamenhof-strato, Port Elizabeth, Sud-Afriko

La plej frua objekto:

Ŝipo “Esperanto” en Hispanio, konstruita kaj inaŭgurita en 1896


La plej malproksimaj objektoj:

- Asteroidoj “Zamenhof” kaj “Esperanto”
- Esperanto-teksto sur disko en kosmoveturilo “Vojaganto 1” kaj “Vojaganto 2” survoje ekster nian sunsistemon

1044 ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTOJ EN 54 LANDOJ

Lando	Stratoj, avenuoj, vojoj, placoj k.s.	Monu- mentoj bustoj k.s.	Memor- tabuloj	Parkoj, arboj, gardenoj, bushaltejoj	Kultur- domoj, muzeoj, firmaoj k.s.	Ceteraj (rivero), fontoj, kosmaj objektoj; sonoriloj)	Sumo	
Argentino	10	2	1	1			14	
Aŭstralio	5		5	5	1		16	
Aŭstrio	9	4	6	5	2		26	
Belgio	10				1		11	
Bjelorusio			1				1	
Brazilo	120	28	3	1	8	1	161	
Britio	6	2	1	4			13	
Bulgario	39	5	7	7	10		68	
Čehio	7	6	7	5	1		26	
Činio		1	1		3		5	
Danio			1		2		3	
Estonio		1					1	
Finnlando	1			2		2	5	
Francio	99	5	4	14	10	1	133	
Germanio	45	2	6	7	1	1	62	
Greklando					1		1	
Hispanio	63	1	6	1	2		73	
Hungario	43	5	13	11	2		74	
Irlando				1			1	
Israelo	12			5	1	3	1	22
Italio	67	2	4	4	5		82	
Japanio	1	1			1		3	
Jugoslavio	1					1	2	
Kanado	2			1	1		4	
Kenjo					1		1	
Kolombio					1		1	
Korea Resp.					1		1	
Kroatio	4	1		2	1		8	
Kubo			1		3		4	
Latvio	1						1	
Libano	1						1	
Litovio	3			2		1	6	
Madagaskaro	1						1	
Makedonio	2	2			2		6	
Malavio					1		1	
Malto	2	1					3	
Nederlando	23	7		8	9		47	
Nepalo		1					1	
Norvegio	4	2					6	
Nov-Zelando	1						1	
Pollando	63	12	16	5	11		107	
Portugalio	1	1					2	
Rumanio			1				1	
Ruslando	2				1		3	
Slovakio			1		1		2	
Sud-Afriko	1				8		9	
Svedio	2			2			4	
Svislando	2		1	1	1		5	
Tunizio					1		1	
Turkio					1		1	
Ukrainio	1	1	1	1	1		5	
Urugvajo	1						1	
Usono	1			1	3	1	6	
Venezuelo		1					1	
Sumo	655	94	95	90	102	8	1044	

INAŪGUROJ DE ZAMENHOF/ ESPERANTO-OBJEKTOJ LAŬ JAROJ



LISTO DE LA 1044 OBJEKTOJ

Post la urbonomo, ronda krampo indikas provincon aŭ federacian landon, en kiu troviĝas la urbo. Angulforma krampo klarigas pli precize la situon aŭ aspekton de la objekto. “E” estas mallongigo por “Esperanto”, “Z” por “Zamenhof”.

Argentino

Córdoba	E-Tabulo	1988
Córdoba	E-Strato	1977
Cosquin	E-Arbo/Tabulo	1989
General Alvear (Mendoza)	E-Strato	1954
General Alvear (Mendoza)	Z-Strato	1954
Mar del Plata	Z-Monumento	1988
Mar del Plata	E-Strato	1989
Rafaela (Santa Fé)	Z-Strato	1959
Rio Ceballos	Z-Strato	1968
Rosario (Santa Fé)	E-Strato	1958
Sáenz Peña (Chaco)	E-Strato	1989
Sáenz Peña (Chaco)	E-Placo	1989
Santa Clara del Mar	Z-Monumento	1993
Venado Tuerto (Santa Fé)	E-Strato	1955



“Plazoleta Esperanto” — la Esperanto-placo en Sáenz Peña, Argentino



Zamenhof-Monumento en Mar del Plata, Argentino



*“Esperanto Court” — Jean Lehane (antaüe) de la loka Esperanto-grupo
prezentas la Esperanto-straton en Toowoomba, Aüstralio.*

Aŭstralia

Adelaide	E-Arbo	1993
Armidale (NSW)	E-Arbo/Tabulo	1987
Balga (Perth)	E-Strato	1982
Benalla	E-Strato	1934
Canberra [jub. arbo]	E-Tabulo	1987
Devonport (Tasmanio)	E-Arbo	1987
Eyre (Olk. Australio)	E-Tabulo	1987
Manly [Gilbert-Parko]	E-Arbo	1987
Manly [Strandavenuo]	E-Tabulo	1989
Melbourne	E-Tabulo	1972
Mount Lawley [jub. arbo]	E-Tabulo	1987
Redcliffe	E-Strato	1963
Richmond (Sydney)	E-Arbo	1992
Sidney	E-Domo	1961
Stirling	E-Strato	1921
Toowoomba (Queensland)	E-Strato	1990



*Tabulo ĉe la Esperanto-arbo en Devonport sur la insulo Tasmanio
en suda Aŭstralia; Michael Field estas aŭstralia politikisto.*



*“D-ro Zamenhof donacis al la homaro Esperanton” estas la enskribo
de la Zamenhof-monumento en Wörgl, Aŭstrio.*

Aŭstrio

Arnoldstein	E-Strato	1975
Graz	E-Placo	1949
Graz [apud E-placo]	E-Tramhaltejo	1947
Graz [ĉe E-placo]	Z-Tabulo	1987
Graz [“La Espero”]	E-Monumento	1987
Grein	E-Placo	1988
Klagenfurt	E-Strato	1953
Knittelfeld	E-Strato	1957
Kritzendorf (Wien)	E-Restoracio	1992
Linz	Z-Strato	1958
Linz [apud lageto inter Kärntnerstr./Bahnhofstr.] ..	Z-Monumento	1965
Linz [Zamenhofstr. 43]	Z-Tabulo	1967

Mariazell	E-Tabulo/Arbo	1993
Mariazell [ĉe baziliko]	E-Tabulo/Arbo	1994
Villach	E-Strato	1963
Wien [Int. E-Muzeo Vieno (IEMW)] ...	E-Muzeo	1929
Wien [Annagasse 5]	IEMW-Tabulo	1967
Wien [en E-parko]	Z-Monumento	1958
Wien [Florianigasse 8]	Z-Tabulo	1924/59
Wien [pri Hugo Steiner]	E-Tabulo	1968
Wien [ĉe Karlskirche]	E-Parko	1992
Wien (XI.)	Z-Strato	1929/56
Wiener-Neustadt	Z-Tabulo	1959
Wiener-Neustadt	E-Parko	1958
Wolfsberg	E-Strato	1963
Wörgl	Z-Monumento	1952



“100 jaroj Esperanto” — jubilea monumento en Graz, Aŭstrio



Esperanto-monumento en Linz, Aüstrio



Tabulo de la Esperanto-placo en Graz, Aŭstrio



“Ĉi tie en la jaroj 1893–1897 logis la kreinto de la internacia lingvo Esperanto, Lazar Markavič Zamenhof” — jen la traduko de la komenca teksto de la tabulo en Grodno, Bjelorusio.

Belgio

Antwerpen	Z-Strato	1954
Assebroek (ĉe Brugge)	E-Strato	1950
Boom (sude de Antw.)	E-Strato	1966
Brussel [Anderlecht]	Z-Avenuo	1960
Leuven [Korbeek-Lo]	Z-Strato	1994
Leuven [Haasrode]	E-Avenuo	1994
Oostende [Torh'steenweg 631]	E-Firmao	1950
Schoten (ĉe Antwerpen)	Z-Avenuo	1968
Sint-Amantsberg (Gent)	E-Strato	1992
Sint-Kruis (Brugge)	Z-Avenuo	1969
Solre-sur-Sambre (Hainaut)	E-Strato	1979

Bjelorusio

Grodno	Z-Tabulo	1991
--------------	----------------	------

Brazilo

Açu (RN)	E-Avenuo	1963
Alto Paraíso [Bona Espero] (GO)	E-Bieno	1957
Alto Paraíso [Bona Espero]	E-Monumento	1980
Alto Paraíso [Bona Espero]	E-Monumento	1993
Alto Paraíso [en la urbo] (GO)	E-Monumento	1993
Alvorada (TO)	Z-Strato	
Alvorada [S. Maris]	E-Strato	
Alvorada [Piratini]	E-Strato	
Ananindeua (PA)	E-Strato	1986



Zamenhof-monumentoj en Marilia kaj Fortaleza, Brazilo

Anápolis (GO)	E-Monumento	1992
Aracaju (SE)	E-Strato	1932
Barra Mansa (RJ)	E-Strato	1980
Barras do Garças	Z-Piedestalo/Monumento	1995
Baurú (SP)	Z-Strato	
Belém (PA)	E-Strato	1972
Belo Horizonte (MG)	E-Obelisko	1957
Belo Horizonte (MG)	Z-Placo	1957
Belo Horizonte (MG)	E-Strato	1949
Belo Horizonte (MG)	Z-Monumento	1950
Belo Horizonte (MG)	E-Kliniko	1973
Boa Vista (RR)	E-Strato	1991
Boa Vista [Bairro Caraña]	Z-Strato	1993
Caçapava (SP)	Z-Strato	1976
Caçapava (SP)	E-Strato	1987
Cachoeira do Sul	E-Strato	
Campinas (SP)	E-Tabulo	1958
Campinas (SP)	E-Strato	1960
Campinas (SP)	Z-Monumento	1984
Campinas (SP)	E-Strato	1991
Campinas [Jardin Lisa]	Z-Strato	1991
Campinas [Jd. N. Maracaña]	Str. "Suda Stelaro"	1991
Caratinga (MG)	E-Strato	1967
Caxias do Sul (RS)	E-Strato	
Chapada dos Guimaraés (MT)	Z-Tabulo	1985
Coração de Jesus (MG)	E-Strato	1952



*Esperanto-monumento
en Vitória,
Brazilo*

Cruzeta (RN)	E-Strato	1963
Curitiba (PR)	Z-Strato	1953
Curitiba [da Glória]	Z-Monumento	1972
Currais Novos (RN)	E-Strato	1965
Feira de Santana (BA)	Z-Strato	1959
Feira de Santana (BA)	Str. "EstrelaVerde"	
Fortaleza (CE)	Z-Monumento	1974
Fortaleza [Papicu]	Z-Strato	
Fortaleza [Vila União]	E-Strato	
Goiânia (GO)	Z-Salono	1975
Governador Valadares (MG)	E-Firmao	1964
Guaratiba	E-Placo	1990
Guarulhos (SP)	E-Strato	
Ilheus (BA)	E-Strato	1981
Ilheus (BA)	Z-Monumento	1985
Indaiatuba (SP)	E-Avenuo	1975
Itapetinga (BA)	E-Strato	1950
Itapetininga (SP)	E-Strato	1957
João Pessoa (PB)	E-Avenuo	1949
João Pessoa (PB)	Z-Strato	
Joinville (SC)	E-Strato	
Juiz de Fora (MG)	Z-Strato	1953
Juiz de Fora (MG)	E-Strato	1970
Juiz de Fora (MG)	Z-Monumento	1980
Juiz de Fora (MG)	E-Bushaltejo	1970
Jundiaí (SP)	Z-Placo	1962
Jundiaí (SP)	E-Strato	1962
Lageado (RS)	E-Strato	1983
Lageado (RS)	Z-Strato	1986
Londrina (PR)	E-Avenuo	
Londrina (PR)	Z-Strato	
Macaé (RJ)	Z-Strato	1957
Macaíba (RN)	E-Strato	1957
Macau (RN)	E-Strato	1959
Maceió (AL)	Z-Strato	1957
Malacacheta (MG)	Z-Strato	1963
Manaus (AM)	E-Monumento	1991
Maraú (BA)	E-Strato	
Marilia (SP)	Z-Monumento	1973
Monte Santo da Minas (MG)	E-Strato	1960
Muritiba (BA)	Z-Strato	1965
Muritiba (BA)	Z-Tabulo	1986
Natal (RN)	Z-Placo	1959
Natal (RN)	E-Placo	1959
Nilópolis (RJ)	E-Strato	1959
Niterói (RJ)	E-Placo	1957

Nova Friburgo (RJ)	Z-Monumento	1968
Nova Friburgo (RJ)	E-Strato	
Nova Friburgo [Guarani].....	Z-Strato	
Nova Iguaçu (RJ)	E-Orfejo	1962
Nova Iguaçu (RJ)	Z-Strato	
Nova Iguaçu (RJ)	E-Strato	



Tabulo sur la monumento en Anápolis informas pri Esperanto.

Novo Hamburgo (RS)	E-Strato	1982
Padre Bernardo (GO)	E-Strato	1988
Palmeira das Missões	E-Strato	
Pedro Velho (RN)	E-Strato	1964
Pompéu (MG)	E-Strato	1967
Porto Alegre (RS).....	Z-Strato	1937
Porto Alegre (RS).....	E-Placo	1953
Presidente Prudente (SP)	E-Strato	
Promissão (SP)	E-Avenuo	1961
Promissão (SP)	Z-Avenuo	1976
Realengo (RJ)	E-Strato	1913
Recife (PE)	E-Strato	1951
Recife (PE)	Z-Strato	1965
Resende (RJ)	E-Strato	1961
Ribeirão Preto (SP)	E-Strato	
Ribeirão Preto (SP)	Z-Strato	
Rio de Janeiro (RJ)	E-Strato	1959
Rio de Janeiro	Z-Strato	1917
Rio de Janeiro	E-Konstruaþo	1959
Rio de Janeiro	E-Bieno	1957
Rio de Janeiro	Z-Monumento	1990
Rio de Janeiro [C. Grande]	Str. Lidja Zamenhof	1991
Rio de Janeiro [C. Grande]	Str. "Suda Stelaro"	1991
Rio de J. [Santíssimo]	Str. Lidja Zamenhof	1994
Rio de J. [Guaratiba]	E-Placo	1990
Rio de J. [B. Tijuca]	Str. Klara Zilbernik	1991
Rio de J. [Bangú]	Str. "Verda Stelo"	1991
Rio de J. [Traversa]	Z-Monumento	1946
Rio de Janeiro	Vojo D-ro Braz Cosenza	1991
Rio Grande (RS)	Z-Strato	1968
Rio Grande (RS)	E-Placo	1969
Rio Grande (RS)	Z-Monumento	1980
Salvador (BA)	Z-Monumento	1959
Salvador (BA)	E-Trapasejo	
Salvador (BA) [Graça]	E-Strato	1937
Salvador [São Caetano]	E-Strato	
Santa Maria (RS)	Z-Strato	1959
Santa Maria (RS)	E-Strato	
Santo Amaro (BA)	E-Strato	1959
Santo Antonio (RN)	E-Salono	1963
Santo Antonio de Jesus (BA)	E-Strato	
Santos (SP)	E-Placo	
Santos (SP)	Z-Monumento	1977
Santos Dumont (MG)	E-Strato	1967
Santos Dumont (MG)	Z-Monumento	1967
São Bernardo do Campo (SP)	E-Strato	1977



Zamenhof-busto sur la Placo de la Respubliko en São Paulo, Brazilo



Zamenhof-strato en Rio de Janeiro, Brazilo; foto el la jaro 1964

São Carlos (SP)	Z-Strato	1970
São João da Boa Vista (SP)	Z-Strato	1959
São Jose dos Campos (SP)	Z-Monumento	1983
São Lourenco (MG)	E-Strato	1970
São Miguel Paulista (SP)	E-Strato	1967
São Paulo [Butantã]	E-Strato	1947
São Paulo (SP)	Z-Monumento	1969
São Paulo [V. Paul.]	E-Strato	

São Paulo [Miguel]	Z-Strato	1967
São Paulo	Str. "Ismaél Gomes Braga"	
São Paulo	Str. "Porto Carreiro Neto"	
São Paulo [Tucuruvi]	E-Strato	1947
São Sebastião do Caí (RS)	E-Strato	1977
Soledade (RS)	E-Strato	1959
Sorocaba (SP)	E-Strato	1952
Sorocaba (SP)	Z-Placo	1989
Taubaté (SP)	E-Placo	
Teresina (PI) [Monte Castelo]	E-Strato	
Ubá (MG)	E-Strato	
Ubá (MG)	Monum. "Prof. Ismaél Gomes Braga"	
Ubá (MG)	Str. "Prof. Ismaél Gomes Braga". 1991	
Uberaba (MG)	E-?	1952
Uberaba (MG)	Z-Monumento	1979
Uberlândia (MG)	E-Avenuo	1953
Uberlândia (MG)	Z-Monumento	1982
Valença (RJ)	Z-Monumento	1975
Vitória (ES)	E-Monumento	1991
Volta Redonda (RJ)	E-Placo	1975

Rimarko: En la brazila ŝtato Maranhão ekzistas urbo kun la nomo "Esperantopolis". La redakcion ne atingis informo, ĉu tiu urbo havas ligon kun la Esperanto-movado.



Zamenhof-monumento inter palmoj en Curitiba, Brazilo



La esperantisto Alan Shrives el Penrhyneddraeth, norda Kimrujo, Britio, logas en Silbernik-placo nomita laŭ la bofamilio de Zamenhof.

Britio

Bournemouth	Z-Benko	1949
Cambridge	E-Teraso	1907
Coatbridge	E-Arbo	1987
Edinburgh	E-Benko	1953
Norwich	E-Vojo	1966
Penrhyneddraeth	Silbernik-Placo	1984
Prestwick/Skotlando	E-Strato	1987
Sheffield	E-Placo	1974
Stoke-on-Trent	E-Vojo	1963
Stoke-on-Trent	Z-Tabulo	1964
Stoke-on-Trent	E-Bosko	1965
Stoke-on-Trent	Z-Monumento	
Stoke-on-Trent [Barlaston]	Z/E-Skulptaĵo	1995



D-ro Marjorie Boulton, Horace Barks kaj William Auld vizitas la Zamenhof-buston en la Hanley-muzeo en Stoke-on-Trent, Britio, en aŭgusto 1981.



Esperanto-vojo en Stoke-on-Trent, Britio

Bulgario

Asenovgrad	E-Placo	1956
Bankja (Solio)	E-Strato	1959
Bankja [Ljulin-Montoj]	E-Monumento	1988
Borima	Z-Strato	1963
Borima	E-Parko	1959
Burgas.....	E-Strato	1962
Dimitrovgrad	E-Parko	1963
Dimitrovgrad	Z-Monumento	1963
Dolna Orjahovica	E-Tabulo "Hristo Popov"	1982
Drajanovo	E-Strato	1984
Gabrovo	Z-Strato	1977
Godek	E-Placo	1969
G. Orjahovica [stacidomo]	E-Tabulo	
Govedarci	E-Strato	1959
Haskovo	E-Strato	1959
Karlovo	E-Strato	1963
Karlovo.....	Z-Strato	1963
Kazanlák	E-Strato	1959
Kazanlák	Z-Aleo	1959
Kazanlák	E-Bushaltejo	1959
Kubrat	Z-Placo	1959
Kubrat	E-Strato	1959
Orjahovo	Z-Montodom	1965
Orjahovo [sur Danubo]	E-Insulo	1930
Orjahovo [sur Danubo]	E-Tabulo	1934
Orjahovo [sur Danubo]	E-Tabulo	1963
Orlovec (ĉe P. Trambes)	E-Parko	1988
Pazarğik	Z-Tabulo	1986
Pazarğik	E-Strato	1966
Pazarğik	E-Kulturdomo	1974

La insulo Esperanto

Apud la urbo Orjahovo troviĝas insulo en la rivero Danubo, kiu en la jaro 1930 ricevis la nomon "Esperanto". Sur tiu insulo troviĝas du Esperanto-memortabuloj. La unua tabulo tekstas jene:

*Aŭgusto 1934
de la delegitoj de XXI kongreso de la bulgaraj esperantistoj
kunsidintaj unu tagon sur insulo "Esperanto"*

La teksto de la dua tabulo:

*La 1an de aŭgusto 1963
honore de la delegitoj de la XIX tutmonda esperantista junulara kongreso
vizitintaj la insulon "Esperanto"*



Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica en bulgara montaro

Pirdop	Z-Strato	1960
Pirdop	E-Parko	1961
Pisanica [Rodopi-montoj]	E-Kulturcentro	1978
Pisanica [Rodopi-montoj]	E-Monumento	1978
Pleven	E-Strato	1959
Pleven	Z-Strato	1964
Pleven	E-Kulturdomo	1986
Pleven [en urba parko]	E-Aleo	1986
Plovdiv	Z-Strato	1959
Plovdiv	E-Kulturdomo	1986
Pomorie	E-Strato	1988
Pomorie	E-Strato	1989
Popovo	E-Strato	1946
Proslav	Z-Strato	1960
Rajeko Konare	Z-Hospitalo	1966
Rozino	Z-Hospitalo	1959
Ruse	E-Aleo	1962
Ruse	E-Strato	1966

Sevlievo	Z-Strato	1959
Sevlievo	Z-Tabulo	1959
Slancev Brjag	E-Restoracio	1967
Slavjanovo	E-Strato	1959
Smoljan	Z-Strato	1967
Smoljan	E-Strato	1967
Smoljan	Z-Monumento	
Sofia	E-Strato	1942
Sofia	Z-Strato	1959
Sofia	E-Muzeo	1982
Srednogorie	Ivan-Krastanov-Monumento	1990
Stanke Dimitrov	Z-Strato	1963
Stara Zagora	E-Kulturdomo	1986
Šumen	Z-Strato	1983
Trjavna	E-Strato	1964
Varna	Z-Strato	1957
Varna	E-Bushaltejo	1958
Veliko Târnovo	E-Strato	1960
Vraca	E-Strato	1965
Vraca	E-Tabulo	1963

Čeħa Respubliko

Bohumín	E-Aleo	1951
Bohumín	Z-Monumento	1947
Františkovy Lázně	E-Tabulo	1991/95
Hradec Králové	Z-Strato	1949
Koprivnice	Z-Monumento	1950
Lančov (ē Třebíč)	E-Kampadejo	1952
Lančov	E-Strato	1987
Lány (kastelo)	E-Arbo	1990
Lázně Bohdhrad	Z-Aleo	1935/59
Nymburk [Boleslavská-str.]	Šilhart-E-Tabulo	1967
Olomouc	E-Vilao	1914
Olomouc	Z-Strato	1932
Olomouc	E-Arbo/Monumento	1932
Ostrava	Z-Monumento	1952
Pardubice	Schulhof-Strato	1947
Pardubice	E-Arbo	
Pardubice	E-Epitaf (honore al Schulhof)	1991
Podebrady	Šak-E-Tabulo	1991
Podebrady	E-Tabulo	1991
Praha [Vršovice]	E-Arbo/Monumento	1987
Příbor [omaġe al E-pioniro T. Čejka] ..	E-Monumento	1964
Příbor	E-Tabulo	1979
Slaný	E-Arbo [tilio]	1990
Třebíč	E-Strato	

Třebíč	E-Epitafio (honore al prof. Kilian) ..	1990
Velke-Losiny	E-Arbo	1967

Rimarko: En la banurbo Lázně Belohrad estis inaŭgurita la 21-an de julio 1935 “Aleo de d-ro L. L. Zamenhof”. En la jaro 1937 la ĉehoslovaka poŝto eldonis poštmarkon kiu montris tiun aleon. Post la germana okupacio en 1938 kaj la mondumilito Ĉehoslovaka Esperanto-Komitato reinaŭguris la aleon la 19-an de julio 1959.

Ĉinio

Beijing [Haidian-distrikto]	E-Restoracio	1995
Chongqing	E-Tabulo	1995
Qingdao	E-Hotelo	1991
Qingdao	Z-Monumento	1992
Zhonghua	Z-Lernejo	1990



Dum la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en 1992 ĉeestis la inaŭguron de la Zamenhof-busto en Qingdao 800 esperantistoj.

Danio

Fredericia	E-Tabulo	1961
København	E-Aleo/Kulturdomo	1990
Middelfart	E-Firmao	

Estonio

Tartu	Z-Monumento	1991
-------------	-------------------	------

Finnlando

Espoo [Irislahti]	E-Strato	1955
Oulu	E-Arbo	1987
Tampere [parko "Sorsapuisto"]	E-Arbo	1995
Turku (asterido)	"Esperanto"	1936
Turku (asterido)	"Zamenhof"	1938



*Allan Mehtonen apud
la Esperanto-arbo en
Oulu, Finnlando*

La Esperanto-arbo en Oulu, Finnlando, estis plantita la 25-an de septembro 1987 en la arbareto "Rauhanmetsä" (trad. "Pacarbaro") sur la insulo Hietasaari, Finnlando, proksime al la malnova haveno kaj al la urbocentro.

En la jubilea jaro de Esperanto la Esperanto-Societo de Oulu ricevis permeson planti memorarbon en la urba "pacarbaretio". Depost 1982 tie estas plantitaj pinoj kaj piceoj fare de urbaj kaj eksterlandaj organizaĵoj pri kulturo kaj internacia amikeco. La Esperanto-arbo havas la numeron 54 en la arbareto; ĝi estas pino (*Pinus sylvestris*). Nomtabulo en finna kaj Esperanta lingvoj informas, ke iniciatis tiun arbon la Esperanto-Societo de Oulu.

Je la tempo de plantado la arbo mezuris 1,5 metrojn. Sur la foto, tiun altecon indikas permane la delegito de UEA en Oulu, Allan Mehtonen. La foto mem estis farita 5 jarojn poste en somero 1992.

La partoprenantoj de la 80-a Universala Kongreso de Esperanto inaŭguris plian Esperanto-arbon en Finnlando julie 1995. En la "Anaso-Parko" (aŭ finne "Sorsapuisto") en la kongresurbo Tampere estis plantita 4 metrojn alta arbo: 5jara "Betula Pendula Biirkalensis". Ĝi varbu kreske por Esperanto!

Francio

Aix-en-Provence (13)	E-Strato	1968
Aix-en-Provence (13)	E-Bushaltejo	1968
Aix-en-Provence	Z-Monumento	1996
Alès (30)	Z-Strato	1959
Amiens (80)	Z-Strato	1931
Angers (49)	Z-Strato	1947
Arles (13)	Z-Vojo	1962
Arras (62)	Z-Strato	1935
Arras (62)	Z-Bushaltejo	1985
Baixas (66)	Z-Placo	1947
Baixas (66)	Z-Strato	1947
Baugé [Grésillon]	E-Kulturdomo	1952
Baugé (49)	Z-Strato	1959
Beziers (34)	Z-Strato	1976
Bischheim (67)	E-Strato	1937
Bondy (93)	E-Aleo	1990
Bondy (93)	E-Arbo	1992
Boulazac (24) [sur RN 89]	Z-Ponto	1990
Boulogne-sur-Mer (62)	Z-Placo	1931
Boulogne-sur-Mer (62)	Z-Monumento	1987
Bourg de Peage (26)	Z-Strato	1959



Esperantista Kulturdomo — Kastelo Grésillon, Francio



Saint-Laurent-du-Var, Francia

Bourges (18)	Z-Strato	1973
Bourges (18)	Z-Aleo	1973
Bourges (18)	E-Strato	1990
Calais (62)	Z-Strato	1972
Caluire et Cuire (69)	Z-Avenuo	1970
Cannes (06)	Z-Strato	1933
Cannes (06) [av. Lattre de Tassigny] ..	E-Hotelio	1930
Cannes (06)	Z-Bushaltejo	1991
Carcassonne (11)	Z-Strato	1955
Carpentras (84)	Z-Strato	1975
Castres (81) [Notre-Dame de la Platé] ...	E-Sonorilo	1977
Caudry (59)	Z-Strato	1954
Cavaillon (84)	Z-Strato	1988
Cavaillon (84)	E-Sakstrato	1989
Cenon (33)	E-Aleo	1987
Cerny (91)	Z-Placo	1979
Chamborigaud (30)	Z-Vojo	1996
Chambéry (73)	Z-Skvaro	1987
Chambéry (73)	E-Tabulo	1989
Chambéry (73)	Z-Monumento	1992
Choisy le Roi (94) [êe stacidomo]	Z-Monumento	1987
Crest (26)	Z-Skvaro	1983
Croix (59)	Z-Strato	1973
Cubjac (24)	E-Ponteto	1988
Dijon (21)	Z-Strato	1960

Draveil (91)	E-Strato	1991
Dunkerque (59)	Z-Strato	1938
Evreux (27)	E-Strato	1959
Eysines (33)	E-Strato	1988
Fleury-les-Aubrais (45)	E-Strato	1961
Fontaine de Vaucluse (84)	E-Tabulo (Petrarca)	1988
Fresnes sur Escout (59)	Z-Strato	1939
Fussy (16)	E-Placo	1992
Gap (05)	E-Strato	1966
Gray (70)	E-Benko	1965
Gray (70)	Z-Strato	1973
Gray (70) [19, rue V. Hugo]	E-Muzeo	1987
Gray (70) [tilio apud muzeo]	E-Arbo	1987
Gujan Mestras (33) [rue Jules Barat] ..	Z-Kulturcentro	1980
Hagondange (57)	Z-Strato	1932
Haguenau (67)	E-Strato	1933
Hasnon (59)	Z-Placo	
Haumont (59)	Z-Strato	1936
Henin Beaumont (62)	Z-Strato	1980
Hennebont (56)	Z-Strato	1970
Hennebont (56)	E-Arbo	1991
Houilles (56)	Z-Strato	1935
Hyères (83)	Z-Strato	1969
Hyères (83)	Z-Sakstrato	1983



Hyères, Francio

Issy les Moulineaux (92)	Z-Strato	1932
Laroque d'Olmes (09)	E-Skvaro	1991
Le Havre (76)	Z-Strato	1956
Le Mans (72)	Z-Avenuo	1963
Le Mans (72)	Z-Bushaltejo	1984
Liévin (62)	E-Strato	1988
Limoges (87)	Z-Strato	1912
Limoges (87)	E-Strato	1980
Lorient (56)	Z-Strato	1984
Lormont (33)	E-Strato	1972
Marseille (13)	Z-Sakstrato	1937
Martigues (13) [Ponte St. Pierre]	E-Restoracio	1988
Montbeliard (25)	Z-Strato	1933
Montboucher s. Jabron (26)	Z-Strato	1973
Montélimar (26)	Z-Strato	1963
Montendre (17)	Z-Salono	1996
Montigny-les-Metz (57)	E-Skvaro	1987
Montpellier (34)	Z-Strato	1979
Montpellier (34)	E-Konstruaĵo (en Z-Strato)	1979
Montpellier (34)	Z-Bushaltejo	1993
Montreuil Juigne (49)	E-Strato	1960




Dum la inaŭgura ceremonio de la Zamenhof-monumento en Chambéry,
 Francio: maldekstre antaüe staras Jean-Paul Calloud, deputito de la
 departemento Alta Savojo; dekstre staras (de antaüe) Louis Besson,
 urbestro, d-ro Louis Chr. Zaleski-Zamenhof, kaj Raymond Boré,
 la iniciatinto. La teksto sur la monumento estas: "La celado de
 ĉiuj homoj devus esti krei harmonian homaron."



“Kiam la popoloj povos libere sin kompreni, tiam ili ĉesos reciproke sin malami.”
Tiu teksto aperas france kaj Esperante sur la Z-monumento en Pau, Francio.

Montreuil Juigne (49)	E-Bushaltejo	1981
Mulhouse (68)	Z-Strato	1933
Nantes (44)	Z-Bushaltejo	1987
Nantes (44)	Z-Strato	1973
Nevers (58)	Z-Sakstrato	1985
Nice (06)	Z-Skvaro	1976
Nîmes (30)	Z-Strato	1967
Nîmes [D-ro-Salan-Str]	E-Strato	1994
Paris [La Défense]	E-Restoracio	1989
Pau (64)	Z-Skvaro	1983
Pau (64)	Z-Monumento	1987
Pau (64)	E-Arbo	1990
Perpignan (66)	Z-Strato	1936
Privas (07)	E-Strato	1962
Quillan (11)	Z-Strato	1964
Rivesaltes (66)	Z-Strato	1954
Romans (26)	Z-Placo	1935
Rueil-Malmaison (92)	Z-Strato	1934
Saint-Avertin (37)	Z-Ĝardeno	1978
Saint-Chinian (66)	E- kaj Ekologia Centro	1986



*La 24-an de majo 1914 homamaso ĉeestas la solenan inaŭguron
de la Zamenhof-strato en Sotteville-les-Rouen, Francio;
la rubando transstrata tekstas "Honoron al Zamenhof".*

Saint-Étienne (42)	Z-Strato	1966
Saint-Felix de Rieutort (09)	E-Strato	1996
Saint-Fons (69)	E-Skvaro	1987
Saint-Gaudens (31)	Z-Strato	1983
Saint-Hilaire-lez-Cambrai (59)	Z-Strato	1978
Saint-Junien (87)	Z-Strato	1966
Saint-Laurent-du-Var (06)	Z-Aleo	1959
Saint-Raphael (83)	Z-Strato	1934
Saleilles (66)	Z-Strato	1984
Sotteville-les-Rouen (76)	Z-Strato	1914
Thiers (63)	Z-Strato	1936
Toulon (83)	Z-Skvaro	1981
Toulouse (31)	Z-Aleo	1996
Tours (37)	Z-Strato	1975
Valence (26)	Z-Aleo	1967
Vallon Pont d'Arc (07)	Z-Kampadejo	1961
Venissieux (69)	E-Strato	1988
Vierzon	E-Tabulo	1995
Villandry [Str. E. Peltier]	E-Tabulo	1959
Villeneuve-Saint-Georges (94)	Z-Strato	1922
Voeuil et Giget (16)	E-Arbo	1989
Yvetot (76)	Z-Strato	1972

Germanio

Aalen (Bad.-Württ.)	E-Biblioteko	1969
Arnsberg (NRW)	Z-Strato	1978
Augsburg (Bayern)	Z-Strato	1978
Bad Kissingen (Bayern)	Z-Tabulo	1969
Bad Kissingen	E-Placo	1991
Bad Nauheim (Hessen)	Z-Tabulo	1950
Bad Säckingen (Bad.-Württ.)	E-Strato	1983
Berlin [Neukölln]	E-Placo	1991
Berlin [Neukölln]	Z-Arbo	1992
Bernburg (Sachsen-Anhalt)	E-Arbo	1986
Bingen-Büdesheim (Rh.-Pfalz)	E-Strato	1968
Bremen	Z-Strato	1966
Dresden-Leuben (Sachsen)	Z-Strato	1927/54
Düsseldorf (NRW)	Z-Strato	1933/66
Düsseldorf	E-Strato	1965
Flonheim (Rh.-Pfalz)	E-Monumento	1962/88
Frankfurt/Main (Hessen)	E-Strato	1977
Frankfurt/Main	Z-Vojo	1977
Frankfurt/Main	Carl-Barthel-Vojo	1977
Fulda (Hessen)	E-Strato	1967
Glinde (ĉe Hamburg)	E-Vojo	1960
Gross-Gerau (Hessen)	Z-Strato	1949
Grosspönsa (Sachsen)	Z-Strato	1964
Hamburg [Berne]	Z-Vojo	1960



Bronza tabulo sur "Villa Franconia" en Bad Kissingen, Germanio:

*"D-ro L. Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo Esperanto,
restadis ĉi tie kun familio unuafoje en julio 1911 por kuracado"*



*Pri la inaŭguro de la Esperanto-placo en Bad Kissingen, Germanio,
ĝojas la iniciatinto Hugo Röllinger kaj la urbestro Christian Zoll.*



Fulda, Germanio

Hamburg [Berne]	Z-Bushaltejo	1960
Hamburg [Horn]	E-Arbo	1971
Hannover (Nieders.)	E-Strato	1951
Hattingen (NRW)	Z-Sakstrato	1963
Hilders/Rhön (Hessen)	E-Strato	1967
Kaiserslautern (Rh.-Pfalz)	E-Strato	1955
Karlsruhe (Bad.-Württ.)	Z-Strato	1960
Karlsruhe	E-Ponto	1968
Kerpen (cc Köln)	E-Strato	1977
Köln	Z-Strato	1961
Kreuth/Tegernsee (Bayern)	Z-Vojo	1960
Leipzig (Sachsen)	E-Epitafio	1960
Mannheim (Bad.-Württ.)	Z-Strato	1972
München (Bayern)	E-Placo	1951
Nordhorn (Nieders.)	Z-Strato	1962
Nordhorn	Z-Bushaltejo	1962
Nürnberg (Bayern)	E-Strato	1959
Nürnberg	E-Tabulo	1990
Oberkirch (Bad.-Württ.)	E-Strato	1962
Oelsnitz (Sachsen)	Z-Strato	1949
Pfaffenhofen/Ilm (Bayern)	Z-Strato	1980
Rüsselsheim (Hessen)	Z-Strato	1967



Admon-monumento en Stockum, Germanio, kun surskribo en Esperanto:
"Viktimoj, 70 000 000, vokadas: Ne vane nin aŭdu admoni, ho mondo,
averto nun estu por vi nia mort'."




Esperanto-sonorilo en Stockum, Germanio, kun jena enskribo: "Gloro al Dio kaj sur la tero paco, sankta familio protektu nin, hodiau donu pacon kaj reunuigon"

Memoriga tabulo en Wehlen, Germanio

La tabulo montrita sube tekstas jene:

D-ro L. L. Zamenhof (1859–1917) parolis ĉi tie en la jaro 1908
al la partoprenantoj de la 4-a Universala Kongreso de Esperanto.
1887–1987, 100 jarojn Esperanto



Pri ĝia inaŭguro raportis d-ro Günter Minkwitz en *Saksa Kuriero*, numero 1/1988:

Ekde la 5-a de septembro 1987 en la urbo Wehlen en la bela regiono "Saksa Svisujo", ekzistas memoriga tabulo kun rilato al Esperanto. Tiu sabloŝtona tabulo omaĝas la iniciatoron de Esperanto, d-ron Zamenhof, kaj memorigas pri la 4-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en 1908 en Dresden. Ĉar en Dresden, kaŭze de dummilita bombardado, ne plu ekzistas historiaj konstruaĵoj, kiuj rilatas al la mencita kongreso, ni uzis la iaman urbodomon de Wehlen, de kies balkono tiutempe la urbestro esperantlingve salutis la gastojn kaj alparolis d-ro Zamenhof partoprenantojn de la UK.

La memorigan tabulon kreis la skulptisto Johannes Peschel el Dresden. Ĝi estis senvalualigita okaze de la Centjara Jubileo de Esperanto. La solenan inaŭguron partoprenis prezidanto de GDREA, Hans Heinel, reprezentantoj de Kulturligo, de la Urba Estraro kaj ĉirkaŭ 250 esperantistoj kaj gastoj, i.a. ankaŭ el ĈSSR kaj Pollando.



*Unika en la mondo: stratkrucigo inter Zamenhof-vojo
kaj Esperanto-vojo en Schwelm, Germanio — iniciatis
ambaŭ stratojn Hanna kaj Heinz Schindler (sur la foto).*

Schwelm (NRW)	Z-Vojo	1967
Schwelm	E-Vojo	1978
Schwerin (Meckl.-Vorp.)	E-Arbo	1992
Stockum/Sauerland (NRW)	E-Strato	1959
Stockum/Sauerland	E-Bushaltejo	1959
Stockum/Sauerland	E-Sonorilo	1959
Stockum/Sauerland	E-Monumento	1961
Stockum/Sauerland	Z-Vojo	1961
Stuttgart (Bad.-Württ.)	Z-Strato	1960
Stuttgart	E-Strato	1983
Stuttgart [Zuffenhausen]	E-Tabulo	1963
Troisdorf (NRW)	Z-Strato	1959
Unterkirnach (Bad.-Württ.)	E-Vojo	1981
Wehlen (ĉe Pirna, Sachsen)	Z-Tabulo	1987
Weiden/Oberpfalz (Bayern)	E-Strato	1967
Wuppertal (NRW)	Z-Strato	1969

Greklando

Paros [Insulo]	E-Restoracio
----------------------	--------------------

Hispanio

Barcelona	Z-Strato	1932/61
Barcelona	Librejo Esperanto	1977
Barcelona	Z-Tabulo	1961
Benidorm (Alicante)	E-Strato	1971
Bilbao	E-Strato	1966
Buñol (Valencia)	Z-Strato	1980
Callosa de Segura (Alicante)	E-Strato	1983
Cartagena	E-Strato	1985
Castellbisbal (Barcelona)	E-Strato	1993
Cervera (Lleida)	E-Strato	1974
Ceste (Valencia)	Z-Strato	1959



*La urbestro de Cervera, Hispanio, malkovras la tabulon
kiu donas la nomon "Carrer Esperanto" al nova strato en la urbo.*



Esperanto-strato dulingue indikita (hispana kaj eŭska) en Bilbao, Hispanio

Cheste	Str. Esperantista Enrique Arnau ..	1991
Cheste	Str. Fr. M. Sanchez	1993
Cheste [str. Sta. Lazaro, 58]	Z-Memortabulo	1911
Figueras	E-Memortabulo	1996
Fuentes de Ebro (Zarag.)	Z-Strato	1959
Gijón	E-Strato	1979
Girona	E-Strato	1969/75
La Laguna (Tenerife)	Z-Strato	1961
La Laguna	E-Strato	1982
La Laguna	Placo Juan Régulo Pérez	1984
La Unión (Murcia)	E-Strato	1985
Les Fonts de Terrassa (Barcelona)	E-Strato	1969
Lleida	Z-Strato	1975
Los Alcázares (Murcia)	E-Strato	1985
Madrid [San Blas]	Z-Strato	1990
Madrid [San Blas]	Strato de la Lingvo Esperanto	1982
Málaga	E-Strato	1972
Málaga	E-Trapasejo	
Manlleu (Barcelona)	E-Strato	1970
Manresa (Barcelona)	Z-Strato	1958
Moià (Barcelona)	E-Strato	1981
Moià	Str. Ramón Molera i Pedrals	1991
Molins de Rey (Barc.)	E-Strato	1965



La magistrato de la urbo La Laguna, Hispanio, lige kun la universitato de La Laguna distingis prof. d-ron Juan Régulo Pérez per la titolo "Adoptita Filo de la urbo San Cristóbal de La Laguna" kaj donis lian nomon al placo de la urbo, okaze de lia emeritigo en oktobro 1984.

Monistrol de Montserrat (Barcelona)	Z-Strato	1968
Olot (Gerona)	Z-Strato	1984
Palencia	E-Strato	1965
Palma de Mallorca [Son Ferriol]	E-Strato	1920
Premià de Mar (Barc.)	E-Placo	1993
Puerto de la Cruz (Ten.)	E-Tabulo	1991
Riells del Fai (Barc.)	Z-Strato	1972
Ripollet (Barcelona)	Z-Strato	1967
Rubi (Barcelona)	Z-Strato	1979
Sabadell (Barcelona)	Z-Bulvardo	1912/75
Sabadell	Z-Monumento	1989
Sabadell	Z-Tabulo	1959
Sabadell	L. M. Espinalt-Strato	1959
Salou	E-Strato	1995
Sant Cugat del Valles (Barcelona)	E-Strato	1971
Sant Feliu de Codines (Barcelona)	Z-Strato	1966
Sant Feliu de Guixols (Gerona)	Z-Strato	1914
Sant Pau d'Ordal (Barc.)	Z-Strato	1968
Sant Pau d'Ordal	E-Muzeo	1985
Santa Cruz de Tenerife	E-Strato	1969
Tarragona	Z-Strato	1968
Tegueste (Tenerife)	E-Strato	1993
Terrassa (Barcelona)	Z-Placo	1912/59

Torre Pacheco (Murcia)	E-Strato	1985
Torrox (Málaga)	E-Avenuo	1987
Tortosa (Tarragona)	E-Strato	
Tortosa (Tarragona)	Z-Strato	1994
Valencia [vidu sube]	E-Tabulo	1923
Valencia	Z-Strato	1934
Valencia	Str. E-ista Hernández Lahuerda ...	1984
Valladolid	E-Strato	1962
Valls	E-Strato	1976
Vigo	E-Strato	1987



Fortaj mašinoj necesis por starigi la plej altan Esperanto-monumenton en la mondo en Sabadell fine de 1989.



Senvualigo de strat-tabulo en Villarodona, Hispanio

Vilafranca del Penedés (Barcelona) ...	Z-Strato	1959
Vilanova i La Geltrú (Barcelona)	Z-Strato	1980
Villarodona (Tarragona)	E-Strato	1992
Villacanas (Toledo)	E-Strato	1977
Zaragoza	Z-Strato	1962
Zaragoza	Ĝardeneto “Glorieta del Esperanto” ...	1996

Rimarko: En Valencia, la E-tabulon inaŭguris partoprenintoj de la 1-a kongreso de iberiaj esperantistoj en 1923 kun la surskribo (trad.): “Al la lernejoj kiel lulilo de Esperanto en Valencia en 1902. La 1-a Kongreso de Iberaj Esperantistoj, majo 1923.” Dum la erao de diktatoro Franco la tabulo estis kaŝita per alia tabulo; la origina tabulo revidebligis post renovigaj laboroj ĉirkaŭ la jaro 1990. La tabulo troviĝas en la korto de la Pia Lernejo, C/Carniceros, 6.

Hungario

Abaújszántó	Str. D-ro Kalocsay	1982
Abaújszántó	Kalocsay-Monumento	1986
Aggtelek (groto)	E-Tabulo	1963
Baja	E-Strato	1993
Békéscsaba	E-Strato	1987
Budapest	E-Parko	1966
Budapest [en E-parko]	Z-Monumento	1987
Budapest [XVII]	E-Strato	1958
Budapest [XVII]	Z-Strato	1959
Budapest	E-Tabulo “I. Széchenyi”	1929

Budapest	E-Tabulo "J. Baghy"	1989
Budapest	E-Kulturdomo	1994
Budapest [en montaro]	E-Fonto	1960
Csorna	E-Strato	1967
Debrecen	Z-Strato	1959
Debrecen	Z-Tabulo	1961
Debrecen	E-Strato	1961
Dunaújváros	E-Tabulo	1987
Dunaújváros	E-Strato	1987
Eger	E-Bulvaro	1976
Eger	Z-Tabulo	1983
Esztergom	E-Strato	1958
Gödöllő (vidu sube)	E-Tabulo	1978
Gödöllő (vidu sube)	E-Tabulo	1987
Győr	E-Strato	
Győr	E-Tabulo	1987
Győr [doganoficejo]	E-Tabulo	1987
Gyula	Z-Monumento	1973
Gyula	E-Placo	1973
Hódmezővásárhely	E-Strato	1994
Kalocsa	E-Strato	
Kazincbarcika	E-Strato	1982
Kazincbarcika Járási	E-Strato	
Kecskemét	E-Strato	
Királykút (montoj Börzsöny)	Z-Belvidejo	1973
Kisújszállás	E-Strato	1994
Komárom	E-Strato	1926
Komló	E-Placo	1976
Makó	E-Strato	1969



Tabulo honore al Julio Baghy en Budapešto, Hungario



Zamenhof-strato (inaŭgurita en 1959) kaj -tabulo (1961) en Debrecen, Hungario. Traduko de la tabuloteksto: "Je la memoro de la elstara batalanto por paco kaj interhoma amikeco d-ro Zamenhof Lajos, pola kuracisto, 1859–1917, kreinto de la internacia lingvo Esperanto".

Mezőberény	Z-Strato	1989
Miskolc.....	Str. D-ro Kalocsay	1957
Miskolc [ĉe Vologda-str.]	E-Placo	1957
Miskolc.....	Z-Tabulo	1957
Miskolc.....	Z-Strato	1960
Miskolc [Hejőcsaba]	E-Strato	1988
Miskolc [Lillafüred, ĉe lago Hámori]..	E-Fonto	1960
Miskolc.....	E-Tabulo	1988
Miskolc.....	Str. Mór Korach	1988
Miskolc-Tapolca	E-Parko	1969
Miskolc-Tapolca	Str. Baghy	1989
Miskolc.....	E-Monumento "D-ro Kalocsay"	1994
Nagybáknak ["J. Baghy"].....	E-Fonto	1980
Nagybáknak ["Kalocsay"]	E-Fonto	1980

Nagykörös	E-Strato	1948
Nagymaros	E-Monto	
Orosháza	E-Strato	1976
Pécel	E-Strato	1961
Pécs	E-Strato	1947
Pécs	E-Parko	1966
Piliscsév (Basinavalo)	E-Fonto	1966
Sopron	E-Strato	1994
Szeged	E-Placo	1957
Szeged	Z-Strato	1960
Szeged	E-Strato	1970
Székesfehérvár	E-Parko	1972
Szekszárd	E-Placo	
Szekszárd	E-Muzeo	
Szekszárd [“Lengyel”]	E-Tabulo	1986



Dulingva tabulo en Szekszárd, Hungario,
informas pri la meritoj de Paŭlo Lengyel.



Esperanto-fonto "Julio Baghy" en Nagybakónak, Hungario

Tata	E-Monumento	1980
Tata	E-Placo	1980
Tatabánya	Z-Strato	1959
Térkepe	E-Placo	1963
Tótkomlós	Z-Strato	1945
Zalaegerszeg	E-Strato	1963

Rimarko: En Gödöllő-Máriabesnyő troviĝas tabulo sur la muro de la kripto honoriganta d-ron Kalocsay kun la teksto “genia poeto de Esperanto”, fiksita en februaro 1978; sur la muro de la somerdomo en Fenyvesi nagyut 76 troviĝas plia tabulo inaŭgurita en aprilo 1987 kun hungarlingva enskribo “En tiu-ĉi domo logis kaj verkis, dum someroj 1928–1955, d-ro K. Kalocsay, Esperanto-poeto, tradukartisto kaj lingvisto.”

Irlando

Cloneygowan	E-Arbo	1992
-------------------	--------------	------



Israelo

Ain Karim [Franciska klostro]	E-Tabulo	
Ain Karim [Kap. de vizito]	E-Panelo	1989
Bat-Jam	Z-Strato	1962
Beer-Ŝeva [kvartalo Naħal Ašan]	Z-Strato	1995
Hajfa	Z-Strato	1962
Hercelya	Z-Strato	1962
Ḩolon	Z-Strato	1962
Jerusalem	E-Tabulo	1966
Jerusalem	Z-Strato	1962
Jerusalem	E-Ĝardeno	1986
Jerusalem [M. Skopus]	E-Muzeo	1988



Zamenhof-strato en Jerusalemo indikita en tri alfabeto

Kfar Ata	Z-Strato	1960
Kfar Saba	Z-Strato	1962
Kiryat Ata	E?	1976
Kiryat Bialik	Z-Strato	1951
Naharija	Z-Strato	1964
Nazaret [Nia Sinjorino]	E-Panelo	1973
Nazaret ["Patro Nia"]	E-Panelo	
Natanja	Z-Strato	1967
Tel Aviv	Z-Strato	1933
Tel Aviv	Z-Pedagogia Centro	
Tel Aviv	Z-Centra Oficejo	



La "Patro Nia" en la korto de la "Pater-Noster-Preĝejo" en Jerusalemo.

La Esperantlingva tabulo najbaras al la franclingva "Patro Nia" inter dekoj da alilingvaj tabuloj kun traduko de tiu fama prego.

Italio

Aci Catena (CT)	E-Strato	1968
Agazzano (PC)	E-Strato	1966
Albenga (SV)	E-Strato	1966
Alessándria	Z-Strato	1959
Aosta	E-Strato	1961
Ascoli Piceno (AP)	E-Placo	1969
Asti	E-Strato	1974
Bari	Strato Roberto de Barillo	1996
Bari	Kafejo "Bar Esperanto"	1996
Bologna	Z-Strato	1955
Calci (PI)	Z-Strato	1987
Carrara (MS)	E-Strato	1965
Carrara (Marina di) (MS)	Z-Strato	1964
Casaléccchio di Reno (BO)	E-Strato	1965
Casaléccchio di Reno	Infanlernejo "Esperanto"	1972
Castel San Pietro Terme (BO)	Z-Strato	1970
Catánia	E-Strato	1967
Cerro Veronesse (VR)	E-Strato	1963
Cérvia (Pinarella) (RA)	E-Placo	1993
Cérvia [Viale dei Mille, 84]	Hotelo Esperanto	1968
Cittadella (PD)	E-Strato	1962
Como	Z-Strato	1964
Cordenóns (UD)	E-Strato	1963
Courgné (TO)	E-Ĝardeno	1994
Courgné (TO)	Z-Tabulo	1994
Fidenza (PR)	E-Strato	1961
Gorizia	Z-Trapasejo	1985
Grosseto	Z-Placo	1964
Grottaferrata (RM)	E-Epitafio [Arturo Martelotta]	1968
Mántova	E-Strato	1961
Margreta di Formigine (MO)	Z-Strato	1987
Massa (Marina di) (MS)	E-Strato	1964
Massa	E-Strato	1960
Massa	Z-Busto	1976
Massa	E-Biblioteko	1960
Menfi (RG)	E-Strato	1962
Milano	Z-Strato	1921
Mirandola (MO)	Z-Strato	1959
Módena	Z-Strato	1962
Parma (Fognano)(PR)	Z-Strato	1968
Pianoro (BO)	E-Placo	1986
Pisa	Z-Strato	1972
Pisa	E-Placo	1988
Pisticci (MT)	E-Strato	1957
Pistóia	Z-Strato	1962



Al D-ro Giovanni Peterlongo la Esperanto-movado ŝuldas la kompletan Esperanto-tradukon (ĉ. en 1914-1918) de la Dia Komedio de Alighieri Dante, aperigita en 1954 (Milano) fare de la filo Ing. Paolo Peterlongo; estas li, kiu havas la meriton, ke li pliriĉigis lukse tiun nekompareblan literaturan verkon, unikan pro poeziaj kvalitoj kaj eblecoj entenataj en Esperanto, per ilustrado de pergamenaj desegnaĵoj de Sandro Botticelli kaj per eleganta tipografia vesto. La supra tabulo honora al D-ro Peterlongo estis inaŭgurita en 1973. Jen traduko de ĝia teksto:

*La kulturantoj de la lingvo universală
okaze de la 44-a Kongreso Itala de Esperanto
rememoras al D-ro Giovanni Peterlongo 1856–1941
humanisto, jugisto kaj tradukinto en
Esperanton de la Dia Komedio
Trento 15-22 septembro 1973*

Pistóia	E-Strato	1966
Póllena Tróccchia (NA)	E-Strato	1983
Ponte San Nicoló (PD)	E-Korso	1972
Porto Empèdocle (AG)	E-Strato	1963
Predappio (FO)	E-Grandštuparo	1993
Ragusa (RG)	E-Strato	1959
Ravenna	Z-Placo	1971
Réggio Emilia	E-Strato	1959
Rimini (RM)	E-Strato	1967
Rimini	Z-Strato	1967

Riolunato	E-Placo	1986
Rionulato	Gallois-E-Tabulo	1986
Roma [kvartalo EUR]	E-Avenuo	1961
San Benedetto del Tronto (AP)	E-Strato	1963
San Giovanni-Lupatoto	E-Strato	1968
San Giuliano Terme (PI)	Z-Strato	1982
Santarcángelo di Romagna	E-Placo	1973
Sciacca (AG)	E-Vojo	1964
Serramazzoni (MO)	Z-Placo	1989
Sorboldo (PR)	E-Strato	1972
Torino	Z-ÂGardeno	1961
Tizzano Val Parma (Schia)	Z-Strato	1974
Tregnago (VR)	E-Strato	1989
Trento	E-Tabulo [Giovanni Peterlongo] ..	1973
Trofarello (TO)	E-Strato	1962
Údine [ê str. Pola]	E-ÂGardeno	1996
Údine [glaciso de la kastelo]	Z-Monumento	1965
Údine [suda periferio]	E-Strato Achille Tellini	1996
Varese	Z-Strato	1960
Venezia [Lido]	E-Strato	1988/93
Verbánia (NO)	E-Vojo	1984
Vercelli (VC)	Z-Strato	1987
Verona	E-Strato	1967
Verona [str. San Nazaro]	E-Firmao	1970
Vicenza	Z-Strato	1996
Villafranca (VR)	E-Strato	1965
Voghera (PV)	E-Strato	1963

Japanio

Kameoka	E-Strato	1963
Kameoka	E-Monumento	1963
Yatugatake	E-Kulturdomo	1994



*“Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo” — moto de Oomoto
sur la monumento de Oomoto-Centro en Kameoka, Japanio*

Jugoslavio

Novi Sad (Vojvodina)	E-?
Subotica (Vojvodina)	E-Strato 1987

Kanado

Oakville	E-Domo 1953
Sainte-Foy (Quebec)	E-Strato 1968
Trois Rivières	E-Strato 1959
Trois Rivières	E-Parko

Kenjo

Mukumu	Z-Kliniko 1970
--------------	-----------	------------

Kolombio

Bogotà	E-Domo 1993
--------------	--------	------------

Korea Respubliko

Pohang	Kliniko "La Espero" 1993
--------------	---------------------	------------

Kroatio

Koprivnica	Z-Monumento 1950
Korčula	Marinko-Gjivoje-Strato 1996
Osijek	E-Parko
Osijek	E-Arbo 1985
Selce	E-Pensiono 1930
Slavonski Brod	E-Strato 1961
Zagreb	Z-Strato 1953
Zagreb	Slavko-Ježić-Strato 1996

Kubo

Habana	E-Centro
Habana	E-Lernejo
Habana	E-Tabulo 1990
Manicaragua/Hanabanilla	E-Kulturdomo



Tabulo de Esperanto-lernejo en Habana, Kubo

Latvio

Liepāja E-Strato 1932

Libano

Beirut E-Strato 1960

Litovio

Kaunas	E-Epitafio "K. Naudžius"	1973
Kaunas	Z-Strato	1923/59
Kaunas	Zilbernik-Domo	1993
Kazlu Ruda	E-Strato	1961
Veisiejai	Z-Strato	1965/89
Veisiejai	Z-Memorôtonoj	1989

Madagaskaro

Antananarivo Z-Strato 1962

Makedonio

Duszniki	Z-Monumento
Prilep	Z-Monumento
Prilep	E-Strato
Prilep	Z-Kliniko
Skopje	E-Strato
Strumica	E-Hotel



La Zamenhof-Monumento en Viesiejai, Litovio konsistas el 2 memorôtonoj — unu horizontala kaj unu vertikala — kun enskribo en litova kaj Esperanta lingvoj: "En ĉi-tiu loko staris la domo en kiu en 1886-1887 logis kaj laboris pri la lingvo Esperanto ties kreinto d-ro Ludoviko Zamenhof."



La iama logdomo de familio Zilbernik, en kiu loĝis la junaj geedzoj Zamenhof, nun portas la adreson "Zamenhof-strato 5, Kaunas" — depost 1993 tiu domo estas la sidejo de Litova Esperanto-Asocio.

Malavio

Lilongve Z-Kliniko 1971

Malto

Msida Z-Strato 1978
Msida E-Strato 1982
Msida Z-Monumento 1990



PROGRAMO

pri la Solena Malkovro,
far D-ro VINCENT TABONE,
Prezidento de la Malta Respubliko,
de la Monumento honore al
D-ro LUDVIK LAZARUS ZAMENHOF
starigita de la Malta Esperanto-Societo
ĉe Msida Marina
la 27-an de Augusto 1990 je la 18.30 h.

PROGRAMM

tal-Kxif Sollenni
minn DR. VINCENT TABONE
President tar-Repubblika ta' Malta,
tal-Monument lil
DR. LUDVIK LAZARUS ZAMENHOF
imwaqqaf
mis-Socjeta ta' l-Esperanto f'Malta
fl-Imsida Marina
fis-27 t'Awissu 1990 fis-6.30 p.m.

*La dulingva programfolio (Esperanta kaj malta) pri la inaŭguro
de la Zamenhof-monumento en Msida, Malto, informas
ke la malta prezidento venis por la ceremonio.*

Nederland

Amsterdam	Z-Strato	1948
Arnhem	E-Aleo	1932
Arnhem	E-Bushaltejo	1932
Bergen op Zoom	E-Monumento	1933/83
Den Burg	E-Monumento	1935/50
Den Haag	Z-Strato	1951
Den Haag [Riouwstr. 172]	E-Kulturdomo	1930
Den Haag ["Rokkefort"]	E-Arbo kun benko	1981
Deventer	Z-Placo	1961
Deventer	Z-Bushaltejo	1961
Dordrecht	Z-Aleo	1962
Enschede	Z-Aleo	1962
Groningen	E-Strato	1966
Groningen	E-Bushaltejo	
Haarlem	Z-Strato	1968
Heemskerk	Z-Strato	1987
Heemskerk	Z-Loĝkorto	1987
Heemskerk	E-Benko	1992
Hoogesand	Z-Placo	1959
Krommenie	Z-Strato	1961
Leeuwarden	Z-Parko	1959
Leeuwarden	Z-Monumento	1966
Leeuwarden	E-Monumento	1966



Farbigante la Esperanto-monumenton sur la insulo Vlieland, Nederlando



La inaŭguron de la Zamenhof-monumento en Bergen-op-Zoom, Nederlando, en 1933 ĉeestis Lidja Zamenhof (sur la foto kun Dick M. Pot). Dum la nazia okupado de Nederlando la monumento estis parte detruita, sed rekonstruita en 1983. Ĝi konsistas el tri partoj: soklo, kolono kaj globo. La soklo estas fortika kaj blanka. Ĝi simbolas la grandan forton, per kiu Zamenhof verkis la lingvon. La soklo havas formon de kvinpinta stelo; tio simbolas, ke la lingvo estas destinita por ĉiuj kvin mondoparto. Ankaŭ la kolono estas kvinpintaforma, sed en la koloro de la espero, la verda koloro. Sur la kolono estas globo. Ĉi-tie la kvin pintoj de la kolono renkontiĝas, ili estas kunligitaj per la vortoj "Esperanto — mondlingvo". Tio simbolas, ke Esperanto estas destinita por ĉiuj homoj, kaj ke ĝi kunligas ĉiujn homojn. (laŭ J. V. Holleman)

Leeuwarden [J.-Bangastr.]	Z-Lernejo	
Lochem	Ŝipo "Esperanto"	1923
Lopik	Z-Aleo	1977
Maastricht	E-Kulturdomo	
Muntendam	E-Aleo	1967
Nieuweschans	Z-Strato	1967
Oostrum	Ŝipo "Esperanto"	1928
Papendrecht	Ŝipo "Esperanto"	1973
Rheden	E-Strato	1961
Roden	Z-Strato	1962
Rotterdam	Z-Strato	1948
Rotterdam [Nieuwe Binnenweg 176]	Centra Oficejo de UEA	1962
Schiedam	Z-Strato	1953
Stadskanaal	E-Aleo	1963
Stadskanaal	E-Bushaltejo	1963
Utrecht	E-Monumento	1966
Utrecht	Z-Aleo	1962
Utrecht	Z-Bushaltejo	
Vlieland (insulo)	E-Monumento	1987
Zeist	Z-Avenuo	1968
Zoutermeer	Z-Strato	1989
Zwolle	Z-Bulvardo	1960
Zwolle	E-Monumento	1975
Zwolle	E-Bushaltejo	1975

Nepalo

Bandipur	E-Monumento	1994
----------------	-------------------	------

Norvegio

Elverum	E-Strato	1965
Hamar	E-Strato	1990
Jørpeland	E-Strato	1964
Loten	E-Strato	1969
Narvik	E-Monumento	1934
Os	E-Monumento	1955

Nov-Zelando

Papatoetoe (Auckland)	E-Strato	1956
-----------------------------	----------------	------

Pollando


Białystok	Z-Strato	1919/49
Białystok	Z-Lernejo	1959
Białystok	Z-Kliniko porinfana	1992
Białystok	Z-Monumento	1973
Białystok [lernejo]	Z-Tabulo	1987
Białystok [infankliniko]	Sekcio Lidia Zamenhof	



*Tabulo en pola lingvo kaj en Esperanto indikas la lokon en Białystok,
kie staris la domo en kiu naskiĝis Zamenhof.*

Białystok [naskiĝdoma loko]	E-Tabulo	1959
Białystok [“J. Szapiro”]	E-Tabulo	1991
Bielsko Biała	Z-Strato	1959
Bielsko Biała	E-Parko	1959
Bydgoszcz	Z-Placo	1975
Bydgoszcz	E-Kulturdomo	1989
Bydgoszcz	E-Hotelo	1989
Bytom	Z-Strato	1959
Bystrzyca Kłodzka	Z-Strato	1960
Bystrzyca Kłodzka	E-Monumento	1967
Chorzów	Z-Strato	1967
Częstochowa	Z-Strato	1932/87
Częstochowa	Z-Lernejo	1987
Duszniki Zdrój	Z-Monumento	1945
Dzierżoniów	Z-Strato	
Gdańsk [Wrzeszcz]	Z-Strato	1947
Gdynia	Z-Strato	1965
Gliwice (kv. Obrońców Pokoju)	E-Strato	1987
Gliwice (kv. Obrońców Pokoju)	Z-Strato	1987
Góra Śląska	Z-Strato	1960
Jelenia Góra	Grabowski-Str.	1945
Jelenia Góra	Z-Tabulo	1948
Jelenia Góra	Z-Monumento	1948
Jelenia Góra	Z-Monumento	1973
Katowice	Z-Strato	
Kielce	Z-Strato	1966
Kikorze	E-Tabulo pri la 15a meridiano	1973

Kłodzko	E-Parko	1961
Kłodzko	E-Monumento	1987
Koszalin	Z-Strato	1976
Koszalin	E-Monumento	1969
Koszalin [Kverko de paco]	E-Arbo	1978
Kraków	Z-Strato	1931/56
Kraków	Z-Tabulo	1931/56
Krościenko	E-Strato	1996
Kutno	Z-Strato	
Leszno Wielkopolskie	Z-Strato	
Łódź	Z-Strato	1920
Łódź	Z-Tabelo	1960
Łódź	Z-Gimnazio	
Łódź	E-Kafejo	1993
Lublin	Z-Strato	



Tabulo sur la muro de la domo en Zamenhof-strato n-ro 9, Varsovio, kie antaue staris la logdomo de Zamenhof (siatempe kun la adreso Dzika 9).



Teksto de memoriga tabulo en Poznań, Pollando:

Ludoviko Zamenhof 1859-1917

Kuracisto, poligloto, kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Sub la pseudonimo d-ro Esperanto li eldonis en la jaro 1887 lernolibron de tiu ĉi lingvo kune kun la vortaro titolita "Lingvo Internacia". Li tradukis en Esperanton vicon da verkoj el la internacia literaturo, li eldonis en tiu ĉi lingvo antologion de literaturaj tekstoj. Li skribis multe da verkoj pri la problemaro de lingvo internacia.

Alia esperantlingva tabulo troviĝas rekte apud la ĉefa strato inter Szczecin kaj Gdańsk en distanco de 35 kilometroj de Szczecin, precize ĉe la vilaĝo Kikorze. Tiu ĉirkaŭ du metrojn alta tabulo portas jenan enskribon:

*Tra tiu loko pasas la 15a meridiano kiu difinas la mezeŭropajn
tempojn. Honore al 500a datreveno de naskiĝo de
Nikolao Kopernik, 1473-1973, Pola Esperanto-Asocio.*

Lubusz	E-Strato
Międzygórze	E-Monumento
Międzygórze	E-Insulo
Mielno	E-Strato 1976
Milanówek	Z-Strato 1987
Myszków	Z-Strato
Niepokalanów	E-Tabulo 1974
Nowa Sól	Z-Strato 1963
Nowy Sącz	Z-Strato 1960
Olsztyn	Z-Strato 1961
Ostrów Wlkp.	Z-Strato 1960
Piotrków Trybunalski	Z-Strato 1986
Police	Z-Strato
Poznań	Z-Tabulo 1960
Poznań	Z-Strato 1960
Przemyśl	Z-Strato
Radom	Z-Strato
Radom	E-Strato
Rzeszów	Z-Strato
Siedlce	E-Strato 1960
Słupsk	E-Monumento 1960
Słupsk	Z-Strato 1988
Sopot	Z-Strato 1959
Sopot	E-Arbo 1959
Sosnowiec	Z-Strato 1960
Śródborów	Z-Strato 1931
Świdnik	E-Strato 1960
Świdnica	Z-Placo 1960
Świebodzin	Z-Strato 1960
Szczawno-Zdrój	Z-Tabulo 1970
Szczecin	Z-Placo 1960
Szczecin	E-Placo
Szopienice (Katowice)	Z-Strato 1978
Tarnów	Z-Strato 1986
Tarnów	E-Strato 1986
Tomaszów Mazowiecki	Z-Strato 1984
Toruń	Z-Strato 1959
Toruń	A.-Grabowski-Str. 1959
Wałbrzych	Z-Monumento 1988
Warszawa	Z-Strato 1931
Warszawa	Z-Tabulo 1959
Warszawa	E-Strato 1960
Warszawa	Z-Lernejo/Tabulo 1961
Warszawa [str. Hoja 42]	A.-Grabowski-Tabulo 1988
Warszawa [Universitato, kemia fako] ..	A.-Grabowski-Tabulo 1995
Warszawa [tombejo]	Z-Monumento 1926

Wejherowo	Z-Strato	1933/88
Wielgewo (Szczecin)	Z-Lernejo	1990
Wieluń	Z-Strato	
Włocławek	Z-Strato	1960
Wrocław	Z-Placo	1961
Wrzeszcz (Gdańsk)	Z-Strato	1947
Zabrze	Z-Strato	
Zabrze [Kirko S. Jozefo]	E-Tabulo	1973
Zagórnik [Szkolna 12]	Z-Lernejo	1990
Zagórnik	E-Tabulo	
Zamość	Z-Strato	
Zielona Góra	Z-Strato	1961
Zielona Góra	Z-Tabulo	1965

Portugilio

Barreiro	Z-Placo	1962
Barreiro	Z-Monumento	1987

Rumanio

Sibiu	Andreo-Cseh-Tabulo	1995
-------------	--------------------------	------

La 20-an de septembro 1995, la tagon de la centjara datreveno de la naskiĝo de Andreo Cseh, rumana teologo, estis feste inaŭgurita, omaĝe al li, marmora memortabulo, fiksita al la muro de la konstruaĵo n-ro 11 de la "Placo de la Revolucio"; t.e. de la domo, en kiu Andreo Cseh unue gvidis Esperanto-kursojn laŭ sia fame konata "rekta metodo" do instrumetodo uzanta en kursoj por diversnacianoj nur Esperanton, speciale por prepari Esperanto-instruistojn. Post la forpaso de Cseh tiu lia sisteme ellaborita metodo estas sukcese aplikata fare de posteuloj, eĉ dum jaroj en eksterlando.

La memorfeston ĉeestis pli ol 50 personoj, i.a. la prezidantoj de la Rumana Esperanto-Asocio kaj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.





Tombo de Ludoviko Zamenhof en Varsovio, Pollando

Ruslando

Bogorodsk	E-Strato	1962
Kazan (Tatarstanio)	E-Strato	1947/88
Sankt-Peterburg	E-Kulturdomo	

Slovakio

Poprad [Spišská Sobota]	Tibor-Sekelj-Tabulo	1995
Pribylina (Altaj Tatroj)	E-Hotelo	1969

Sud-Afriko

Benoni	E-Aĉetcentro	
Ceres	E-Firmao	
Johannesburg	E-Komerca Centro	
Kempton Park	E-Domo	1970
Pieter Moritzburg	E-Domo	1949
Pieter Moritzburg	Domo "Bona Espero"	1970
Port Elizabeth	Z-Strato	1985
Pretoria	E-Domo	1965
Pretoria	E-Domo	

Rimarko: La firmao en Ceres nomigas "Fruktekspota Farmbieno Esperanto"; la domoj en Kempton Park, Pieter Moritzburg kaj Pretoria estas apartamentaj konstruaĵoj.

Svedio

Göteborg	E-Placo	1955
Göteborg	E-Bushaltejo	1968
Malmö	E-Strato	1981
Malmö	E-Bushaltejo	1982



Tabulo ĉe bushaltejo en Göteborg, Svedio



Zamenhof-monumento en Barreiro, Portugalio. La monumento, 6 metrojn alta, havas triangulan formon por reprezeneti la tri lingvo-grupojn, sur kiuj fundamentas Esperanto. Sub la relieve de Zamenhof estas legeble:
“Al Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917)
okaze de l' centjariĝo de Esperanto, 12-4-1987”.

Svislando

Genève	Z-Tabulo	1921
La Chaux-de-Fonds	E-Bushaltejo	
La Chaux-de-Fonds	E-Kulturcentro	
Locarno [Solduno]	E-Placo	
Romanshorn	E-Vojo	1965

Tunizio

Tunis	E-Firmao
-------------	----------------

Turkio

Istanbul	E-Firmao
----------------	----------------

Ukrainio

Odessa	Z-Monumento	1986
Rava Ruskaja	Z-Parko	1987
Slavjansk (Donecka prov.)	E-Centra Oficejo	1991
Ternopil	Mihailo-Jurkiv-Tabulo	1995
Veiseja	E-Strato	1964

Urugvajo

Montevideo	E-Strato	1972
------------------	----------------	------

Usono

Garden Grove (Kalifornio)	Kulturdomo “E-Oazo”	1990
Lincoln (Nebraska)	E-Pavilono	1994
Minneapolis	E-Firmao	1993
Ophir (Alaska)	E-Rivereto	1917
Saipan (Insuloj Marianaj)	Z-Strato	
Washington	Kosma E-Sondisko	1977

Rimarko: Sep mejlojn okcidente de Lincoln troviĝas “Parko de Paco”, en kiu Nebraska Esperanto-Asocio instalis pavilonon kun enskriboj pri Zamenhof kaj Esperanto.

Pri la “Esperanto Creek” en Alasko raportas William P. Vathis, Spokane, kaj J. Weeks, Anchorage:

En la jaro 1917 la geometro G. L. Harrington oficiale registris la nomon “Esperanto Creek” por rivereto en Alasko. La oficiala listo de nomoj de lokoj indikas pri la situo: “Esperanto Creek, rivereto, fluas nordokcidenten, 36,8 km nordokcidente de Ophir, en la Montoj Kilbuck-Kuskokwim; 156° 50' W, 63° 27' N. Loka nomo.”

La urbeto Ophir estis fondita en 1908, kiam ministo tiu-noma trovis oron tie. En 1910 loĝis en Ophir 122 homoj, sed en 1930 nur 19. Dum tiu tempo regis en Alasko la “or-febro”, kiam multaj orserĉantoj vagadis tra la regiono. Eble iu orserĉanto kiu estis esperantisto nomis la rivereton “Esperanto Creek”.

Venezuelo

Maracaibo E-Monumento 1989



Monumento en la korto de la strato Deribasovskaja 3 en Odessa, Ukrainio

ŜIPOJ OFICIALE NOMITAJ “ESPERANTO” KAJ “ZAMENHOF”

Dum unu el miaj prelegaj restadoj sur Tenerifo mi legis en la libro pri la Hispana Esperanto-Kongreso en La Laguna en la jaro 1991 ilustritan raporton pri “la ŝipo Esperanto”. Pleninteresite mi petis detalojn de la raportinto, Francisco J. Dávila Dorta, prezidanto de la Esperanto-Societo de La Laguna. Li donis al mi artikolon el la gazeto *El Día* de la 23-a de septembro 1990, kiu entenis raporton pri la historio de la haveno en la ĉefurbo Santa Cruz de Tenerife, inter alie priskribanta impresojn de la 14-a de oktobro 1920:

Je l' matena krepusko videbligis la alvenanta “Esperanto”, kvazaŭ ega “fruktujo” kun multjara kaj bona historio, kiu alvenis de la haveno Puerto de la Cruz kun spektakloriĉa ŝargo je grapolegoj da bananoj . . .

Verkis la artikolon la ĵurnalisto Juan A. Padrón Albornoz, intertempe forpasinta, siatempe bona amiko de Francisco Dávila. Por esti preciza en historiaj detaloj, Francisco Dávila dum semajnoj traesploris gazetarajn arkivojn ĉirkaŭ 75 jarojn returnen. Evidentiĝis ke dum tiuj jaroj kvazaŭ kontinue kaj regule aperis raportoj pri la alveno de la ŝipo “Esperanto” en la haveno. Francisco Dávila petis la esperantiston Aürelio Solís Pi el Santa Cruz kontinui la enketadon en la hejma haveno de ŝipo “Esperanto”, kaj li poste donis detalan raporton:

En nia mara teritorio inter alie navigis 3 ĝemelaj ŝipoj, apartenantaj al la sama transport-entrepreno. La ŝipoj nomiĝis “San Carlos”, “Consuelo de Huidobro” kaj “Esperanto”. Por la du unue mencitaj la ekzistado finiĝis malfeliĉe en nia insula maro. “Consuelo de Huidobro” koliziis kun alia ŝipo kaj dronis for de la insula maro. Pli stranga estis la sorto de “San Carlos”. Dum la Dua Mond-




Meze de la foto troviĝas ŝipo “Esperanto” en la malnova haveno de Garachico, Tenerife, Hispanio.

milito tiu ŝipo transportis petrolojn al la germanaj submarŝipoj. Por ili estis instalita sekreta provizejo ĉe la bordo de la insulo Fuerteventura. Tie, laŭdire, "San Carlos" estis torpedita de angla submarŝipo. Sed kio vere okazis, estas eĉ pli strange. Ĉar ne angla, sed germana submarŝipo torpedis tiun hispanan helpŝipon. Tio evidentigas kiel fakteto el raporto de hispana sergento, kiu rakontis pri la katastrofo al Rafael González Echegaray, la posta guberniestro de Tenerifo, kaj li rakontis al sia amiko, la ĵurnalisto Juan Antonio Padrón Albornoz. Laŭ tiu priskribo la hispana maristo observis mir-okule de sur la strando, vid-al-vide de Tarajalejo en Fuerteventura, ke subite germana submarŝipo ekaperis sur la maro, pafis torpedon kontraŭ la "amika" ŝipo kaj rapide malaperis sub la ondojn oceanajn. "San Carlos" renversiĝis kaj restis en tia pozicio por iom da tempo antaŭ ol malaperi en la maron. Felice ĉiuj maristoj povis sin savi, eĉ ne unu mortis.

Multe pli longan vivon havis "Esperanto". Regule ĝi albordiĝis en la haveno de Santa Cruz, plenŝargita de banano-grapoloj el la norda parto de la insulo Tenerifo, aparte fekunda teritorio. Post la jaro 1934, kiam hispanaj trupoj estis okupintaj la teritorion Ifni troviĝanta sur la okcidenta afrika marbordo, "Esperanto" kune kun siaj ĝemelaj ŝipoj transportis interlige al tiu kolonio korespondaĵojn kaj varojn.

Nun jam de multaj jaroj "Esperanto" ripozas sur la submara grundo de la rivera haveno de Las Palmas de Gran Canaria. Fine de la jaro 1966, post 70 jaroj da marista aktivado, ĝi silente subakvigis.

La ĵurnalisto Padrón Albornoz mem vidis la altajn mastojn elstarantajn el la ondoj proksime de la bordo. Intertempe ĝi estas tute kovrita pro nova avenuo konstruita marborde.



"Zamenhof", granda oceana ŝipo, forlasis la ŝipfarejon de Split, tiama Jugoslavio, en 1959. La ŝipo apartenis al la Pola Oceana Linio kaj kapablis porti ŝargon de 12.800 tunoj. Intertempe ĝi cesis plugi la oceanajn ondojn.

La teknikaj datumoj de la ŝipo “Esperanto” estis:

Konstrujaro	1896	Kilprofundeco	2,26 m	Mašinpovo	140 ĈV
Droniĝo	1966	Ŝippezo	262 tn	Ducilindra vapormašino	
Longeco	42,30 m	Rapideco	6 nodoj	Karbujo por	32 tn

La oficiala dokumento por la identigo de la ŝipo, la Navigacia Matrikulo, estis eldonita de la koncerna oficejo en Málaga. Kia do estis la situacio de esperantismo en tiu andaluzia havenurbo dum la epoko de la lanĉo de la ŝipo, en 1896?

Nu, unu el la unuaj esperantistoj en Hispanio logis ĝuste en Málaga: José Rodríguez Huertas, instruisto. En 1890, li verkis la unuan Esperantan lernolibron por hispanoj, en 1891 li fondis la unuan Esperanto-Societon en Hispanio en Málaga (la kvina en la mondo). J. R. Huertas ĝuis altan reputacion en Málaga; li estis amiko persona de hispana deputito. J. R. Huertas do estis elstara personeco en Málaga kaj certe grave influis la oficialan nomigon de ŝipo per la nomo “Esperanto”.

Nun jam delonge silentas la maŝina zumado de ŝipo “Esperanto” — la probable unua Zamenhof/Esperanto-Objekto en la mondo. Aŭdiĝu plu por ĉiam la lingvo, kiu prunte estis doninta al ĝi la nomon.

En Nederlando: Tri ŝipoj “Esperanto” daŭre survoje

En la lando de la multaj kanaloj, depost jaroj veturas tri ŝipoj, ĉiuj kun la nomo “Esperanto”, kiel informas Helmut Klünder el Germanio. Jen la oficialaj datumoj pri la ŝipoj:

Oficiala ŝipa numero	2100052	2303835	2313929
Nomo	<i>Esperanto</i>	<i>Esperanto</i>	<i>Esperanto</i>
Šipspeco	sarĝ-motorŝipo	sutsarĝa motorŝipo	sarĝ-motorŝipo
Devena lando	Nederlando	Nederlando	Nederlando
Posedanto	Pols Jahn, Lochem	Wal J. Van Der, Oostrum	Esperanto-VOF, Papendrecht
Konstrujaro	1923	1928	1958
Longo	69 m	31 m	99,9 m
Larĝo	9,5 m	6,6 m	9,5 m
Tonelaro (RT)	1024 RT	216 RT	1822 RT
Registra dato	31 dec 1926	1 jan 1928	31 dec 1973

LIMOGES, TERRASSA AŪ SABADELL? KIU URBO UNUAFOJE NOMIS STRATON LAŪ ZAMENHOF AŪ ESPERANTO?


La demando pri la urbo en kiu kiel unua oficiale estis nomita strato aū placo laŭ Zamenhof aū Esperanto, estas diverse prezentita en nia literaturo ĝis nun — post pli ol cent jaroj da esperantismo. En la verko “Doktoro kaj Lingvo Esperanto” de Holzhaus oni povas legi sur paĝo 107, ke la franca urbo Limoges unafoje en la mondo donis la nomon “Zamenhof” al strato, nome en la jaro 1907. La samon asertas noto sur urba mapo de Limoges. Sed aliaj fontoj asertas, ke la unua urbo, kiu nomis straton “Zamenhof”, estis Sabadell en la jaro 1909 okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en apuda Barcelono. Revuo “Esperanto” de la 20-a de septembro 1912 notas, ke *“al la katalunaj urboj Terrassa kaj Sabadell apartenas la honoro, ke ili unuaj donis la nomon ‘Zamenhof’ al unu el siaj placoj kaj stratoj. (En) Terrassa estas la unua vojo, kiu glorigas nian movadon . . .”*

Tion konfirmas la *Esperantista Centra Oficejo*, Paris, 1913, en “Oficiala Rapporto pri la Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo”, aŭg. 1912.

La *Enciklopedio de Esperanto*, 1933/34, enhavas la etaton pri 51 urboj tiaspecaj kaj citas kiel la plej fruan (trad.) “Bulvardon de D-ro Zamenhof”, 1912, en Sabadell.

Danke al historiaj dokumentoj ni scias, ke en Terrassa oni inaŭguris Zamenhof-placon je sabato, la 29-a de junio 1912. Du semajnojn poste, dimanĉe, la 14-an de julio 1912, la urbo Sabadell inaŭguris la Bulvardon Zamenhof. Sed kiam fakte oni inaŭguris la “Rue Zamenhof” en Limoges?


Elira bazo por heligi tiun enigmon estas letero de Zamenhof mem de la 25-a de februaro 1907, en kiu li respondas al peto de la Esperanto-grupo Limoges:



“Kara Sinjoro!

Se la estraro de Via urbo
deziras doni al iu el la stratoj
la nomon ‘Louis Zamenhof’,
mi volonte donas mian per-
meson kaj mi dankas kore
por tiu honoro, kiun la urbo
al mi faros kaj per kiu ĝi
multe servos al la propagando
de Esperanto.

Via
L. Zamenhof”



Inauguro de la Zamenhof-strato en Sabadell, Hispanio, en la jaro 1912

Sed kiel trovi la leteron el Limoges, kiu siatempe estis la kaŭzo de tiu responde? Persona restado miaparte en Limoges restis sen sukceso. Feliĉe helpis hazardo: Dum prelega restado en Kastelo Grésillon en Francio en 1986, je mia surprizo ĉeestis sinjoro Raymond Gueguen el Limoges, kiu poste serĉis en la arkivoj de la urbo Limoges la leteron de la Esperanto-grupo al Zamenhof. S-ro Gueguen trovis la leteron: La 15-an de februaro 1907 s-ro Léon Berland, ĝenerala sekretario de la Klubo Esperantista Limoges, “petegas la permeson” de Zamenhof; jen parto de la letero:

“Kara majstro! Je la nomo de la Klubo Esperantista, kiu bone sukcessis gajni por Esperanto grandan parton de nia logantaro, permesu al mi saluti la respektatan majstron, kiu multe faris por la homaro kaj por la kunigo de la popoloj... Hodiaŭ mi volas al vi paroli pri ideo kiu venis al mi, kaj por ĝia efektivigo mi petas vian permeson. Mi pensis doni vian nomon al strato, ni nomus ĝin ‘Strato Louis Zamenhof’. Mi petas vin sendi al ni tiun permeson, ĝi estas necesa por la propagando. Atendante baldaŭan respondon, ricevu, mi petas, kara majstro, miajn plej respektemajn salutojn.”

Nur dek tagojn poste Zamenhof konsentis. Sed nenie en la arkivoj de Limoges troviĝis dokumento, kiam fine la urbo inaŭguris straton kun la nomo “Zamenhof”. La tiama oficiala organo de la franca Esperanto-movado ja raportas pri multaj aktivecoj de la grupo en Limoges, pri festo, koncerto, prelegoj kaj kursoj en 1907, sed ĝi ne mencias nomigon de strato. Raymond Gueguen valoran dokumenton en la arkivoj. Ĝi pruvas, ke nur en decembro 1912 fine reaperas la “Rue Zamenhof” en la protokoloj de la Esperanto-klubo de Limoges: La 17-an de decembro 1912 klubanoj renkontiĝis kaj verkis protokolon pri tiu kunsido



La plej longdaŭre seninterrompe ekzistanta Zamenhof-strato estas “Rue Zamenhof” en Limoges, inaŭgurita en 1912.

en franclingva “kajero de raportoj”. Manskribi ni trovas la noton: “*Prezidanto s-ro Duris gratulas nome de la grupo s-ron Janot, nian simpatian samideanon, kiu estas doninta al strato la nomon de la aŭtoro de Esperanto, kio kaŭzis, ke en Limoges ni havas nun la straton Zamenhof*”, laŭvorte en la franca: “... que à Limoges nous avons maintenant la Rue Zamenhof”.

Oficiala listo pri la stratoj en Limoges el la jaro 1913 fakte mencias sur paĝo 1300: “Zamenhof (rue)”. La Zamenhof-strato en Limoges evidente estis inaŭgurita antaŭ la 17-a de decembro 1912, sed verŝajne post julio, do post la inaŭguroj de la placo en Terrassa kaj la strato en Sabadell, ĉar en septembro 1912 UEA en sia organo oficiale deklaris la urbojn Terrassa kaj Sabadell kiel la unuajn kun Zamenhof-stratoj. Se tio estus estinta eraro, malfavore al Limoges, tiu grupo certe estus petinta korekton.

Evidente la propono pri Zamenhof-strato en Limoges restis netraktita dum pluraj jaroj. En majo 1912 Léon Berland, la ĝenerala sekretario de la Esperanto-grupo de Limoges, estis elektita urbestrarano. Kvin jarojn antaŭe li mem iniciatis la ideon pri Zamenhof-strato, eventuale lia ideo nur realigis post kiam li estis elektita urbestrarano. Restas tamen enigme, kial la protokolo de la Esperantoklubo de Limoges de la 17-a de decembro 1912 ne mencias s-ron Berland en la ĉapitro pri la nomigo de “Rue Zamenhof”.

Resume, al la urbo Limoges estas atribuenda, ke tie esperantisto unafoje havis la ideon, en 1907, 20 jarojn post apero de la “Unua Libro” pri la Lingvo Internacia, nomi straton laŭ ties aŭtoro, Zamenhof.

La unua honorigo de Zamenhof per nomigo de strato aŭ placo tamen okazis aliloke, nome la 29-an de junio 1912 en la kataluna urbo Terrassa, kiam la ĝistiamia “Placo de Zaragoza” ricevis la novan nomon “Zamenhof-placo”.

LA UNUA ZAMENHOF-MONUMENTO

Dum pentekosto 1914 esperantistoj inaŭguris imponan monumenton honore al d-ro Zamenhof en la parko de la banurbo Franzensbad en la tiama Aŭstra-hungara Imperio. Dudek kvar jarojn poste, en aŭtuno 1938, trupoj de la germana nazia régimo okupaciis la urbon kaj detruis la monumenton. Nun la urbo nomiĝas Františkovy Lázně en Ĉeĥa Respubliko; en la lastaj jaroj konkretiĝis klopodoj restarigi la monumenton.

Dimançon, la 31-an de majo 1914, do du monatojn antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito, esperantistoj inaŭguris la unuan monumenton honore al d-ro Zamenhof kaj Esperanto. Tio okazis komence de la “4-a Tutaŭstria Esperanto-Kongreso” en Franzensbad, la nuna Františkovy Lázně. La kongreson partoprenis 319 esperantistoj el ĉiu distrikto de la tiama aŭstria imperio kaj el najbaraj landoj.

Sabate, la 30-an de majo 1914, la kongreso malfermis ekspozicion pri Esperanto en la hotelo “Parkhotel”. Dum la interkona vespero salutparoladis la loka klubestro, Jakob Hechtl, la iniciatinto de la monumento. Dimanĉe, post diservo, s-ro Hechtl speciale salutis delegitojn de la ministerio, partoprenantajn oficirojn kaj eminentajn esperantistojn. La kongreso sendis saluttelegramon al la imperiestro Franz Josef.

Sekvis la solena inaŭguro de la Zamenhof-monumento en loko taŭge elektita, bone harmonianta sur placo en la parko. Jacob Hechtl festparoladis; dum la momento de la malkovro la urba orkestro ekludis la himnon, kiun kunkantis ĉiuj kongresanoj.



*Inaŭguro de la unua Zamenhof-monumento en Franzensbad,
Aŭstrohungara Imperio, en majo 1914*

Vere impone staris tiu ĉirkaŭ 5,5 metrojn alta monumento kiel unua tiaspeca en la mondo; ĝis tiam nur kvar stratoj nomitaj laŭ Zamenhof estis inaŭguritaj en la mondo. Tiu monumento estis la ununura inaŭgurita dum la vivo de d-ro Zamenhof.

La supra parto de la monumento, kiu konsistis el kvarpilastra bloko de ŝtono, prezantis la terglobon, tenatan de simbolaj figuroj. Meze de la monumenta bloko troviĝis kvinpinta stelo, sub ĝi bronza reliefo de la busto de Zamenhof kun pripersona enskribo. Sur la soklo de la monumento estis legebla la teksto:

*PER ESPERANTO AL KOMPRENIĜO,
AL PACO, AL LABORO KAJ AL DIO!*

Tiel la monumento staris bone flegata, impresoplena por dekmiloj da homoj, kuracgastoj diversnaciaj. La iama Esperanto-organizaĵo de la germanoj en Ĉeĥoslovakio harmonie estis kunlaborinta kun la ĉehaj kaj alinaciaj esperantistoj en la multnacia ŝtato. Pasis 24 jaroj. Tiam, en aŭtuno 1938, absolute kontraŭe al la surmonumenta devizo pri paco, la german-nazia regimo aneksis la randteritorion de Ĉeĥoslovakio, la tiel nomatan "Sudetan Landon". La naziistaj trupoj komplete detruis kaj dispartigis la Zamenhof-monumenton. Pri detaloj mankas raportoj.

En printempo 1989 Ĉeĥa Esperanto-Asocio per faldfolio proklamis la intencon restarigi la monumenton kaj iniciatis mon kolekton. Celo estis inaŭguri la novan monumenton en 1992 kadre de la tiutempe por 1992 planita Universala Kongreso en Prago. La Kongreso tiujare ne okazis en Prago, kaj daŭre ne estas starigita nova monumento.


Intertempe, sendepende de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la Asocio de Esperantistaj Handikapuloj inaŭguris tabulon dum sia jarkunveno en Františkovy Lázně la 19-an de oktobro 1991. La tabulo havis grandecon de 50 oble 40 centimetroj; ĝi estis fiksita je la sama loko kie staris la iama monumento kun jena enskribo:

*LA 1-AN DE JUNIO 1914 ESTIS ĈI TIE INAŬGURITA
KAJ 1938 DETRUITA LA UNUA EN LA MONDO
GRANDA MONUMENTO DE D-RO L. L. ZAMENHOF
MEMORTABULO DEDIKITA DE E-HANDIKAPULOJ*

Tiu teksto nek citas la vorton "Esperanto" nek klarigas la personecon de Zamenhof, krome la inaŭgura dato de la monumento estas malĝusta. Pro tio mi proponis al la Asocio de Esperantistaj Handikapuloj fiksi sub la tabulo plian tabulon kun klariga teksto. La Asocio aprobis la ideon kaj preparis ties realigon, sed okazis nova atenco de vandalismo: la 10-an de junio 1994 la tabulo estis komplete detruita fare de loke loĝanta ebria lernanto. Laŭ konstato de la urba komisiono de Františkovy Lázně tion li faris por pruvi al siaj kameradoj sian forton. Li devis pagi etan punon en alteco de ĉirkaŭ 15 nederlandaj guldenoj, sed ne kompensis la damaĝon.

La Asocio de Esperantistaj Handikapuloj tamen ne rezignis pri la plano kaj inaŭguris novan tabulon spite al financaj problemoj. La 8-an de aprilo 1995 estis solene inaŭgurita nova memoriga tabulo kun teksto laŭ mia propono

(vidu la foton malsupre). La tabulo konsistas el sveda granito kaj mezuras 50 oble 70 centimetrojn. Partoprenis la inaŭguron ĉirkaŭ 50 personoj, inter kiuj la ĝenerala banloka direktoro, la prezidanto de la Asocio de Esperantistaj Handikapuloj, Josef Vaneček, kaj reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Dum la senvualigo de la tabulo, komuna kantado de la himno memorigis al la unika inaŭguro okazinta samloke pli ol 80 jarojn antaŭe, la 31-an de majo 1914. Restu tiu inaŭguro espereble la lasta "metamorfozo" ĉi-rilata, ĉar certe restas viva en la koroj de multaj la deziro, ke plejeble baldaŭ estu trovita ebleco por rekonstruo digna al la iama fierega unua monumento honore al d-ro Zamenhof.



La nova tabulo en la parko de Františkovy Lázný, Čeĥio

LA “FORGESITA ESPERANTO-ŜTONO” EN NARVIK

La historio de la monumento en la nord-norvega urbo Narvik estas la plej aventura el ĉiuj aliaj. Unua instigo por mi enketi pri la “Esperanto-ŝtono” estis artikolo en “Dia regno” el la jaro 1991, en kiu Arne Lundkvist mencias “forgesitan Esperanto-ŝtonon” en Narvik. La ŝtono mem originas el la jaro 1934, kiam inaŭguris ĝin esperantistoj el 15 landoj. Nur ses jarojn poste, la ŝtono disjetiĝis pro bomb-atako dum la Dua Mondmilito. Dum preskaŭ kvar jardekoj la ŝtonpecoj kuŝis ie sur deklivo apud norvega fjordo, ĝis iu promenanto hazarde trovis tiun ŝtonpecon kiu portas la Esperanto-lingvan surskribon. Depost 1980 tiuj partoj de la ŝtono estas videblaj en la stacidoma parko de Narvik. Zorga korespondado dum du kaj duono da jaroj rezultigis, ke eblas prezenti jen detale la kronikon de tiu unika monumento:

En la jaro 1934 la sveda ĉefurbo Stockholm gastigis la pli ol 2.000 partoprenantojn de la 26-a Universala Kongreso de Esperanto. La 11-an de aŭgusto 1934, tuj post la fermo de la kongreso, 125 esperantistoj renkontiĝis en la Stokholma stacidomo por komune vojaĝi 1.500 kilometrojn norden trans sveda Laponio ĝis la erc-haveno Narvik en norda Norvegio, 200 kilometrojn norde de la Polusa Cirklo, la plej norda urbo en la mondo kun Esperanto-grupo. Prof. Carl Støp-Bowitz tradukis por ni la norveg-lingvan artikolon el “Esperanto-Bladet” n-ro 9, 1934:

*La memorŝtono sur la supro de la monteto Fagerness
Vizito de kongresgastroj en Narvik*

Kiel konate, post la fino de la Stokholma kongreso estis aranĝitaj diversaj ekskursoj, inter alie unu al Narvik, kiu meritas apartan atenton. 125 ekskursanoj el 15 landoj vojaĝis de Stockholm per ekstra vagonaro tuj post la fino de la kongreso. Ili alvenis en Narvik la 16-an de aŭgusto post longa, sed interesa veturado tra tutu Svedio. En Narvik ilin akceptis lokaj esperantistoj, gvidataj de instruisto Georg Rokkan, kaj post kiam ĉiuj manĝis lunĉon en du el la hoteloj de la urbo, oni vizitis la Erc-kompanion kaj la novan preĝejon, kaj poste sekvis ekskurseto sur la fjordo en belega vetero. Je la 16-a horo oni revenis, kaj per aŭtoj oni veturis al restoracio Fjellheim sur la supro de monteto Fagerness, kie oni tagmanĝis kaj aŭskultis vicon da paroladoj, kiuj laŭdis la ekskurson. Proksime al la restoracio estis starigita memorŝtono nun senvalualigota. La tuto farigis neforgesebla solenaĵo, tiel skribis la gazetoj de Narvik. Generalo Bastien prizorgis la senvaligon, interpretante la grandan valoron, kiun havis la ideo pri la starigo de ĉi tiu memorŝtono. Sekvis mallongaj paroladoj . . .

La ŝtono portis la jenan surskribon:

E S P E R A N T O
ANKAŬ EN ĈI TIU MONDANGULO
ATINGIS KAJ VENKIS LA HELPLINGVO INTER LA POPOLOJ.
STARIGITA LA 16 AŬGUSTO 1934 EN
ĈEESTO DE ESPERANTISTOJ EL 15 NACIOJ.

Dum la senvaluiga ceremonio advokato Emsetron el Germanio laŭlegis poemon speciale verkitan por tiu evento, raportas *Norvega Esperantisto*, kiu publikigis la tekston de tiu poemo:

*Memorston' en alta nordo
je norvega mara bordo
ne ombrumas vin olivoj,
krudaj estas la deklivoj.*

*Lando virga, roko-bruna,
lando de l' meznokto suna.
Land' fiera kaj benata,
estu kore salutata.*

*Limo de logata tero,
preskaŭ estas atingita.
Jen atestas por la vero
štano, tie konstruita.*

*Apud maro senripoza,
en naturo grandioza,
estu ĉiam atestanto
de l' eterna Esperanto.*

Norvega gazeto de aŭgusto 1934 donas eĉ pli da detaloj pri la inaŭgura ceremonio:

... *Tiu ceremonio fariĝis solenaĵo neforgesebla. S-ro Rokkan, Narvik, bonvenige salutis en Esperanto, kaj la franca generalo Bastien, Parizo, faris la malkovron kaj la inaŭguron. Poste sekvis vico de paroladoj: advokato Emsetron, Königsberg, legis poemon verkitan por la solenaĵo. Sekvis lektoro Canuto, Italio, rektoro Carlo Damrek, Ĉehoslovakio, ingeniero Govcott, Anglio, prof. Pamparov, Bulgario, De Wast, Nederlando, Mussie Stoes, Belgio, s-ino Malmgren, Stockholm, Svedio, Isabel Cochrane, Skotlando, Revier, Algérie, kaj pluraj aliaj. Tagjurnalo el Narvik titoligis sian raporton per "Esperanto, la savanta angelo por ĉiu popoloj".*

Bedaŭinde la štono ne longe tronis super la fjordo ĉe Fjellheim. La 9-an de aprilo 1940 germanaj trupoj komencis okupacii la gravan erc-havenon Narvik, kie oni eksportadis la ercon el la proksima sveda urbo Kiruna. Kvin tagojn poste anglaj trupoj klopadis forpeli la okupaciantojn, sed sekvis unu monato da terura batalo. Narvik estis komplete detruita. Unu el la multaj bomboj eksplodis proksime de la Esperanto-štano, jetis ĝin malproksimen kaj rompis ĝin en pecojn.

Preskaŭ kvar jardekojn poste reaperis almenaŭ parto de la štono: S-ro F. Framnes el Narvik, promenante ĉe la loko Fjellheim, en la jaro 1979 trovis la tri ŝtonpecojn, unu apud la alia, kun la enĉizita surskribo. La pecoj kuŝis sur la deklivo de la monteto Fagernes ĉirkaŭ 350 metrojn super la fjordo. La skribajo estis bone legebla, sed la trovinto ne komprenis, en kiu lingvo tiu teksto estas skribita. Li donacis la torson al la urbo de Narvik. Ankaŭ tie neniu el la kontaktitaj personoj komprenis la enigman tekston, kiu estis bone legebla, sed mankis ja la decida vorto "Esperanto" ĉizita en la ne trovita kapitelo de la monumento.



Memorŝtono en Narvik, super la fjordo, fotita en 1934. La teksto sur la memorŝtono estas: "Esperanto — Ankaŭ en ĉi tiu mondangulo atingis kaj venkis la helplingvo inter la popoloj." S-ro Osvald Nicolaisen el Stockholm partoprenis la inaŭguron kaj fotis la ŝtonon.

Por deĉifri la tekston, oni petis la universitaton de Tromsø pri helpo. Pri tio aŭdis bakisto Rolf Holm el Tromsø. Li estas esperantisto, kaj li eĉ persone ĉeestis la inaŭguron de la Esperanto-ŝtono en 1934 en Narvik. Preskaŭ kvin jardekojn poste Rolf Holm denove vojaĝis al Narvik kaj tuj identigis la ŝtonpecojn kiel la trunkon de la "Memoriga Ŝtono".



Rolf Holm identigas la trunkon de la memorŝtono 50 jarojn post la inaŭguro.

La urbo de Narvik kunligis la ŝtonpecojn kaj skribis al Norvega Esperanto-Asocio je la 25-a de marto 1980 jenan noton:

La Memoriga Ŝtono de la Universala Kongreso 1934 estos gardata en Narvik. La ŝtono mezuras 62 x 58 centimetrojn, disfendita en 3 partojn. Por gardi ĝin kaj doni al ĝi centran lokon, ĝi devas esti metita plate sur betona subaĵo . . . La ŝtono havu sian lokon en la fervoja parko, kie ĝi havos centran lokigon en jam preta aranĝo.

La gazeto Fremover el Narvik raportis je la 23-a de aprilo 1983:

Pli ol 20 esperantistoj de la Fervojistaj Societoj en Kiruna kaj Narvik siatempe partoprenis la senvaluigon de la ŝtono. "Vi sendube povas raporti, ke mi estas la lasta postvivanto el la ĉeestintoj en 1934", diris Rolf Holm al nia ĵurnalisto . . . Siatempe troviĝis aktiva esperantista medio en Narvik, grandparte inter la fervojistaro. Holm ne scias, ĉu restis iuj el la Esperanto-parolintoj.

La gazeto Fremover ricevis reagon de leganto, kiun ĝi aperigis du tagojn poste, la 25-an de aprilo 1983:

P l i a j e s p e r a n t i s t o j

"Veršajne grave eraris la esperantisto Rolf Holm. Ankaŭ mi ĉeestis la eventon (en 1934) kaj mi efektive daŭre vivas", diras Tryggve Bjøstad al nia "urbo-rubriko". "Ankaŭ mi partoprenis la Esperanto-kurson. Mi supozas, ke ankoraŭ vivas multaj el la ĉeestintoj", diras Bjøstad.

Jen la eksterordinara historio de la Esperanto-ŝtono en Narvik, kiu nun kuſas nur kelkajn paſojn for de la stacidomo, en kiu alvenis la 125 esperantistoj en aŭgusto 1934 dum la postkongresa vojaĝo de Stokholmo al la nordnorvega Narvik.

La translokigo de la Esperanto-ŝtono al centra loko de la urbo en la fervoja parkon por ĝin protekti kaj honori, signifas elstaran distingon de la internacia lingvo fare de la urbo Narvik, kiu pro tio meritas rekondon kaj dankon. La urbo ĉiuĝare ornamas la Memorigan Ŝtonon per floroj dum la daŭro de la norda somero.

La nova gvidfolio pri la vidindaĵoj de Narvik eldonita de la Turisma Oficejo mencias tekste kaj bilde la “memorigan ŝtonon kun Esperanto-teksto”. Instigite pro la enketado fare de la aŭtoro, la urbo Narvik petis sian park-oficejon esplori “pli da infomoj pri la Esperanto-ŝtono”.

Ankoraŭ la Esperanto-movado modeste konsoliĝu per la fakteto, ke tiu unika historiplena monumento estas mirakle savita el trista epoko. Sed iutage eble revoj kaj esperoj pri renesanco restariga realiĝos, por ke reviviĝu la parolo de la solena inaŭguro:

*“Memorston’ el alta nordo
je norvega mara bordo,
estu ĉiam atestanto
de l’ eterna Esperanto!”*



*La trunko de la Esperanto-ŝtono nuntempe
kuſas inter floroj antaŭ la stacidomo de Narvik.*

Helpis en la detektiva rekonstruo de la historio de la Esperanto-ŝtono: Anton Kronshage, Schwelm, Germanio; Arne Lundkvist, Hägersten, Svedio; Roland Lindblom, Haninge, Svedio; Prof. Carl Støp-Bowitz, Oslo, Norvegio; Anna-Greta Strönne, Malmö, Svedio; Rolf H. Holm, Tromsø, Norvegio; F. Framnes, Narvik, Norvegio; Per Engen, Hamar, Norvegio; Osvald Nicolaisen, Stockholm, Svedio.

LA ESPERANTO-MONUMENTO EN DEN BURG, NEDERLANDO

La 30-an de majo 1935 oni inaŭguris en Den Burg sur la nederlanda insulo Texel Esperanto-monumenton. Iniciatis ĝin la fratoj Duinker, redaktoroj de Teksela Gazeto; konstruis ĝin la esperantisto kaj masonisto De Waal. Dek jarojn poste, en 1945, De Waal revenis al la insulo kiel kanada soldato por liberigi la insulon de nazia okupado. Li retrovis la monumenton detruita.

En 1941 la germanaj okupantoj ordonis malkonstrui la monumenton, ĉar Zamenhof estis judo. La direktoro de la "komunumaj laboroj" sur Texel, Tiessen, petis al kelkaj fidelaj laboristoj ne rompi la granitajn partojn, precipe ne la bilden de Zamenhof, kaj meti la partojn en apudan kampdomon por poste ilin transporti al sekura loko.

Nesciante pri ĉi tiu bona intenco de direktoro Tiessen, miaj amikoj C. kaj W. Keizer kaj mi en malluma vespero ŝteliris en la kampdomon. Ni rompis la fenestron kaj forprenis la kaŝitajn pecojn de la Esperanto-monumento por transporti ilin al la iniciatoro de la monumento, J. Duinker, kiu kompreneble tre ĝojis pri tio.

Kie J. Duinker kaſis la partojn, mi ne scias, ĉar la fratoj Duinker, mia amiko W. Keizer kun sia frato Petro kaj ses aliaj estis mortpafitaj de la germanaj okupantoj la 6-an de aprilo 1945. Kvar personoj, inter kiuj mia frato, savis siajn vivojn forkurinte el la ekzekutejo.

Ekster nia grupo neniu sciis ion pri tiu "ŝtelado" de la pecoj de la antaŭa monumento. Kompreneble ni tre bedaŭras, ke la partoj kiujn ni klopojis savi, ne estis retrovitaj.

Post la milito, en 1950, la monumento estis restarigita. Sur la malsupra maldekstra flanko estis metita tabulo (vidu la foton).

N. van Heerwaarden (tradukita de J. J. Labordus)





Esperanto-monumento en Den Burg, insulo Texel, Nederlando


OBJEKTOJ EN LA KOSMO — KIAM “ZAMENHOF” RENKONTOS “ESPERANTON”?

Inter la orbitoj de la planedoj Marso kaj Jupitero cirkulas multaj asteroidoj, etaj planedoj, inter kiuj du estas oficiale nomitaj “Zamenhof” kaj “Esperanto”. La “Asteroida Cirkulero” n-ro 1350 eldonita en 1956 en Cincinnati, Usono, informas:

“(1421) ESPERANTO = 1936 FQ. Malkovrita fare de Y. Väisälä la 18-an de marto 1936 en Turku. Nomita omaĝe al la internacia lingvo proponita de L. L. Zamenhof en 1887 por ĝenerala scienco uzado. La aŭtoro uzis la pseŭdonimon “Doktoro Esperanto”.

(1462) ZAMENHOF = 1938 CA. Malkovrita fare de Y. Väisälä la 6-an de februaro 1938 en Turku. Nomita honore al L. L. Zamenhof (1859–1917), pola kuracisto kaj aŭtoro de la internacia lingvo, Esperanto.”

Prof. d-ro Y. Väisälä estis elstara finna esperantisto kaj prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).



La orbitoj de “Zamenhof” kaj “Esperanto” inter Marso kaj Jupitero

Kelkaj astronomiaj datumoj:

Planedo resp. Asteroido	Distanco de suno (mio km)	Daŭro de cirkulado (tera jaro)	Rapideco (km/sek)	Diametro (km)
Tero	150	1,00	29,8	12.742
Marso	228	1,88	45,4	6.800
Esperanto	460	5,40	91,6	20–50
Zamenhof	471	5,56	93,8	10–30
Jupitero	778	11,86	154,9	142.800

Por observanto de sur la Tero eĉ la plej grandaj asteroidoj estas videblaj nur kiel punktetoj similantaj al steloj. Asteroidoj nur brilas, ĉar ili estas lumigataj de la suno. Tial ili brilas ju pli hele, des pli grandaj ili estas. Sekve, la relative pli grandan asteroidon "Esperanto" oni povas observi per modernaj teleskopoj.

Kaj "Esperanto" kaj "Zamenhof" cirkulas ĉirkaŭ la suno laŭ similaj orbitoj, sed en diversaj rapidecoj. Tio kaŭzas ke ili reciproke alproksimiĝas ĉiujn 186 jarojn. Lastfoje tio okazis en la jaro 1840. Sekve en la jaro 2026 "Zamenhof" renkontos sian "Esperanton".

Mesaĝo por eksterteruloj en Esperanto

La usona spackompanio NASA (Nacia Aeronaŭtika Spaca Administracio) en la jaro 1977 sendis du kosmoveturilojn "Vojaganto 1" kaj "Vojaganto 2" trans nian sunsistemon kaj eĉ en pli forajn distancojn de la galaksio. La du kosmoveturiloj portas orumitajn diskojn kun sonoj de la tero.

Sur tiu disko troviĝas poemo de Baudelaire en la franca lingvo, krome mesaĝoj en la lingvoj angla, flandra, indonezia, persa, sveda, urdua kaj en la niĝeria lingvo Efik, kaj ankaŭ mesaĝo en Esperanto.

La 2-an de junio 1977 Ralph Harry, tiam Aŭstralia Ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, estis invitita registri mesaĝon al eventualaj inteligentaj estaĵoj ie en la kosmo, kie surplanedigus "Vojaganto 1" aŭ "Vojaganto 2".

Ralph Harry registris angle kaj Esperante la jenan tekston:

"Amikoj, mi parolas al vi el la planedo Tero. Mi reprezentas la landon Aŭstralio, la insulan kontinenton en la suda hemisfero de nia planedo. Ni strebas vivi en paco kun la popoloj de la tuta mondo, de la tuta kosmo, kaj labori kun ili por komuna bono de ĉiu viva estaĵo. Mi salutas ĉiun, kiu komprenas. Adiaŭ!"

Jurnalisto el Nov-Jorko demandis s-ron Harry, ĉu li vere kredas, ke inteligenta persono en la Lakta Vojo komprenas Esperanton. Harry respondis, ke li certas, ke eksterteraj inteligentuloj deĉifros la Esperantan tekston pli rapide ol la poemon de Baudelaire.

Intertempe la kosmoveturiloj jam vojaĝis preter Jupitero, Saturno kaj eĉ Plutono. De Neptuno ili sendis fotojn al la tero. "Vojaganto 1" kaj "Vojaganto 2" ne havas sufice da energio por daŭre sendi fotojn al la tero, sed ili ja vojaĝos pliagn milionojn kaj milionojn da kilometroj kun la Esperant-lingva mesaĝo portante la internacian lingvon eĉ ekster nian sunsistemon. Post kvardek mil jaroj ili atingos la unuan stelon "najbaran" al nia sunsistemo kun la nomo AC+793888.

LA ZAMENHOF-MONUMENTO EN OSTRAVA — LA DU-URBA MONUMENTO

Unikan historian sorton havas la Zamenhof-monumento en Ostrava en Ĉeĥa Respubliko. Jen ĝia historio:

La origina inaŭguro de tiu monumento okazis en la jaro 1936 en Bohumin. Tiutempe ekzistis en tiu urbo multnombra, aktiva Esperanto-grupo, prezidita de s-roj Trombala kaj Raszka.

La monumento estis kreita honore al la tradiciaj rilatoj de la german-ĉeĥoslovakaj kaj polaj esperantistoj kaj havis kvarlingvan enskribon, en Esperanto, en la ĉeĥa, germana kaj pola lingvoj.

Tamen, la ekzisto de tiu simbolo de Esperanto daŭris nur mallonge. En la jaro 1938 komenciĝis la okupacio de la tiama Ĉeĥoslovakio fare de la nazi-germanaj trupoj, kaj la monumento devis malaperi. Kelkajn jarojn post la milito surprize la unuopaj partoj de la monumento estis retrovitaj sub ŝtona materialo en laborejo de Bohumina ŝtonminejo, okaze de likvidigo de germana firmao. La partoj de la monumento estis zorge kaŝitaj kaj tute kompletaj. Tamen oni ne povis starigi tiun monumenton denove ĉe la origina loko, ĉar intertempe la aktivaj Bohuminaj esperantistoj estis starigintaj tie novan monumenton, la 5-an de oktobro 1947.



Zamenhof-monumento en Ostrava



Zamenhof-monumento en Novy Bohumin

Por tamen reutiligi la retrovitajn monumentojn, feliĉe ja savitan el trista epoko, la Bohumina klubo donacis ĝin al la Esperantista Societo Ostrava, kiu ĝoje kaptis la okazon kaj decidis, sub gvidaj iniciatoj de Alois Kubala, restarigi la monumenton en nova aspekto kaj nova senco.

La monumento estis inaŭgurita en la Rotter-parko en Ostrava, la 11-an de majo 1952 kun dulingva enskribo, en Esperanto kaj la ĉeĥa, omaĝe al la 360-a datreveno de la naskiĝo de la ĉeĥa pedagogo Amos Komenský (Comenius), kiu jam en la mezepoko kiel unua filozofo esprimis la ideon pri internacia lingvo. La enskribo tekstas:

Traduko el la ĉeĥa:

*MEMORE AL J. A. KOMENSKÝ
PRAPATRO KAJ ČEĎHA PIONIRO
POR LA IDEO DE INTERNACIA HELPLINGVO*

Latine:

VIA LUCIS, 1641 XIX. 14.

En Esperanto:

*EFEKTIVIGIS
D-RO ESPERANTO
26 VII 1887*

Traduko el la ĉeĥa: *1592 PER ESPERANTO AL LA MONDPACO 1952*

LA “RENASKIĜO” DE MONUMENTO EN BRAZILO

Raporto el la Esperanto-klubo en Santos-Dumont

En 1967 la Esperanto-klubo kaj la “Lions”-klubo de Santos-Dumont inaŭguris monumenton pri Zamenhof, sur la rando de la federacia strato 135 malantaŭ armea kazerno. Prezidis la solenaĵon Shamuel Divon, ambasado de Israelo.

Post iom da tempo la busto restis malzorgata apud la ŝoseo; buboj komencis ludi kun la busto, ili eĉ grimpis sur ĝin.

Iun tagon hazarde tion vidis s-ro Herminio Rotatori, instruisto de profesia lernejo de Brazila Fervojo. Li rekonis la figuron de Zamenhof, kvankam la busto jam estis ekrompita ĉe la kravato, la oreloj, la nazo kaj la maldekstra ŝultro. Rotatori ĉagreniĝis kaj savis la buston portante ĝin hejmen por protekti ĝin kontraŭ pliaj detruoj.

Jarojn poste s-ro Alphonso Miranda, direktoro de Brazila Esperanto-Ligo, vizitis s-ron Rotatori kaj vidis en ties domo la rompiĝintan buston de Zamenhof. Tuj s-ro Miranda klopodis restaŭrigi la buston, sed nek la katedro de belartoj de la Federacia Universitato, nek la lokaj fakuloj aŭ la restaŭrantoj de sanktaj skulptaĵoj volis helpi.

Pasis pliaj dek jaroj, kiam s-ro Miranda aŭdis pri lerta skulptisto aperinta en la urbo. Tiу rigardis la buston kaj tuj konsentis restaŭri ĝin. La busto alvenis ĉe la skulptisto sabate je la 10-a horo matene. Precize 24 horojn poste, dimanĉe je la 10-a horo, la artisto vokis s-ron Miranda, por ke li prijuĝu la restaŭradon. Gaje surprizis ĉiujn, ke Zamenhof sur la restaŭrita busto ŝajnis ekridi, malgraŭ la severa mieno. La busto estis komplete riparita. La artisto laboris dum la tuta nokto. Ĉu miraklo? Ne, nur dediĉa laboro. Tri tagojn poste la lerta skulptisto translokiĝis al alia urbo. Neniu scias kien li iris. Eĉ lian nomon neniu scias, tial ne eblis pagi la honorarion al la lerta skulptisto.

S-ro Guimares, urba konsilanto, proponis reinaŭguri la buston en la ĉefa strato de la urbo. Tio okazis ĝuste en 1987, la jubilea jaro de Esperanto. Dekoj kaj dekoj da esperantistoj partoprenis la reinaŭguron montrante, ke la idealo de Zamenhof intertempe fariĝis realaĵo eĉ en urbeto je miloj kaj miloj da kilometroj for de Bialistoko.



Zamenhof-busto en Santos Dumont, Brazilo, dum la inaŭguro en 1967

“ESPERANTO JES, ZAMENHOF NE!” — ESPERANTO-STRATO EN GIRONA

Pri la estigo de la Esperanto-strato en Girona, Hispanio raportas J. Masias Sala el Girona:

Meze de la 60-aj jaroj mi ricevis leteron de Ines Gaston eksplikanta la intencon de la Hispana Esperanto-Federacio havi en Girona straton kun la nomo “Zamenhof” aŭ “Esperanto”.

De tiam mi skribis al la Urbestro kaj ankaŭ vizitis lin. Finfine en la jaro 1969 oni elektis malgrandan strateton en apuda kvartalo kaj donis al ĝi la nomon “Esperanto”.

En la jaro 1975, okaze de Esperanto-renkontiĝo, la partoprenantoj vizitis tiun strateton. La esperantistoj el Girona regalis la vizitantojn per trinkaĵoj kaj kuko. Eble oni povas diri, ke tio estis la oficiala inaŭguro.

Mi preferis la nomon “Zamenhof”, sed en tiu epoko laŭdire la finaĵo “-hof” sonis kiel komunisma afero, kaj la sekretario de la urbestro siatempe diris al mi: “Esperanto, bone, sed Zamenhof NE!” Supozeble la nomo “Zamenhof” tro memorigis la sekretarion pri nomoj kiel de la sovetia reginto Hrusĉov, kaj pro tio la nomo de la iniciatinto de Esperanto ne rajtis ornami stratſildon.



Ne plu timo pri “hof”-finaĵo: la Zamenhof-strato en Madrido, Hispanio



LA HISPANA MILITO KAJ LA “STRATO DE L’ ESPERANTISTO HERNANDEZ LAHUERTA”

Dum la jaroj 1936 ĝis 1939 en Hispanio furiozis kruela popola milito, atence de la parto de la faŝisma hispana movado kontraŭ la reganta parlamenta demokratio. Tiу tragedio havis siajn ne malpli tragediajn konsekvencojn rilate la nacian Esperanto-movadon. Reflekta impreso pri la eventoj evidentiĝas el la faktoj, ke inter la nun ekzistantaj 72 “ZEOj” en Hispanio nur 8 originas el la jaroj antaŭ 1938, kaj ke 3 el tiuj 8 estas restarigitaj maljam en 1959 resp. 1979, inter ili la 2 unuaj en la mondo, t.t. tiuj en Terrassa kaj Sabadell! Kiuj influoj estis dominantaj, kiaj cirkonstancoj decidaj?

La tradicio de la hispana Esperanto-movado estas fieriga. En 1909 la reĝo, Alfonso la 13-a, distinge nomumis d-ron Zamenhof “Komandoro de la Hispana Reĝa Ordeno de Izabela la Katolika”. La prezidento de la unua hispana respubliko, Francisco Pi y Margall, subtenis grave Esperanton. La posta prezidento, Niceto Alcalá Zamora, akceptis en 1933 la Honoran Prezidantecon de la 10-a Hispana Kongreso de Esperanto en Santander. La lasta antaŭ-popolmilita Esperanto-kongreso en Barcelona, 1936, okazis sub la Honora Patroneco de la tiama prezidento de la respubliko, Manuel Azaña.

Inter la esperantistoj, kiuj partoprenis la popolmiliton sur la respubliko flanko, estis ankaŭ la prezidento de la tiama Hispana Esperanto-Asocio, Julio Mangada Rosenörn. Post la milito li elmigris en ekzilon al Meksikio. Alia grava esperantisto kaj deputito en la respubliko parlamento estis la arkitekto Francisco Azorín Izquierdo, laŭ kies aktiva instigo estis akceptita rezolucio favora al Esperanto fare de la Partio Socialista. Mi havis la plezuron persone konatiĝi kun li dum SAT-kongreso en Stuttgart (Germanio) en 1929, post kiu li restis unu el miaj politikaj korespondantoj, eĉ post lia elmigro al meksika ekzilo.

Dum la hispana milito aro da esperantistoj estis, kiel tiaj, ekzekutitaj, ekzemple en Córdoba kaj Valencia. Esperantistoj, kiuj restis enlande, riskis perdi sian liberecon aŭ eĉ sian vivon en koncentrejo aŭ prizono, ĉar dum la milito estis organizita grava kontraŭfašisma informado en internacia skalo ĝuste per Esperanto. Inter la diversaj publikigoj tiaspecaj certe estis la plej grava la "Popola Fronto"; ĝi estis eldonita de la "Laborista Grupo Esperantista" en Valencia kaj aperis de novembro 1936 ĝis januaro 1939, redaktis ĝin Luis Hernández Lahuerta ĝis sia enkarcerigo. Ĉiumonate li estis vizitinta la tranĉeojn de la respublikanaj esperantistoj.

Luis H. Lahuerta naskiĝis en Valencia en la jaro 1906 kaj vivis tie ĝis sia morto en 1961. Li estis oratoro kaj verkisto — en la lingvoj kastilia, kataluna kaj Esperanta, kaj li kунfondis Hispanan Esperanto-Federacion en 1947. Honore al li, la urbestraro de Valencia la 6-an de februaro 1984 decidis oficiale nomigi straton "Calle Esperantista Hernández Lahuerta", tradukite "Strato de l' esperantisto Hernández Lahuerta".

UNIKA METODO "KONKERI" ESPERANTO-AVENUON

Dum prelega restado sur la Kanaria Insulo Tenerifo en januaro 1993 mi hazarde vidis ekzempleron de la germanlingva surloka porturista gazeto *Inselzeitung Wochenspiegel*, kiu estis aperinta preskaŭ jaron antaŭe, en marto 1992. En ĝi mi vidis ĉi-suban foton pri tabulo, perfekte fiksita sur muro de domo en la urbo Tegueste sur la insulo Tenerifo.



"AVENUO ... ? GENIO SERĈATA"

La gazeto akcentis ke nek temas pri spritaĵo nek pri karnavala ŝerco, sed ke fakte estas serĉata geniulo por nomi la straton, ĉar tutevidente en la historio de la urbo Tegueste mankas elstaraj personecoj indaj nomi je ili tiun avenuon.

Tian alvokon esperantisto ne povas ignori! Tia alvoko vekas iniciaton! Rakontinte pri la afero en kunveno de la Esperanto-Societo de la insulo en La Laguna, la 3-an de marto 1993 mi vojaĝis al Tegueste kaj konstatis ke la strato fakte ankoraŭ estis sennoma. Tute spontanee kaj neanoncite mi vizitis la urbodomon kaj estis ĝentile akceptita de la urba respondeculino pri edukado kaj de du pliaj membroj de la urba konsilantaro. Post intersalutoj mi, la germana ferianto, sen plia enkonduko deklaris al ili: *“¡Señores, tengo genio para Ustedes!”* — “Gesinjoroj, mi havas genion por vi!”

La “oficialaj mienoj” afable kaj surprizite ridetis pri la neordinara oferto de la eksterlanda vizitanto. Mi prezantis surtable abundan informan materialon pri la internacia lingvo: la “Jarlibron de UEA”, ekzempleron de “Heroldo” kaj gazetojn, sed ankaŭ tabelojn, kiuj pruvas ke tiutempe jam preskaŭ 950 avenuoj, placoj, stratoj, monumentoj aŭ pontoj estis nomumitaj laŭ unu difinita geniulo, nome laŭ geniulo lingvistika, d-ro Ludoviko Zamenhof, aŭ laŭ ties verko, Esperanto. Komprenble mi citis ankaŭ la rilatojn de la Esperanto-movado al Unesko kaj la valoron de neŭtrala facile aplikebla interkompreneilo favore al la Eŭropa integrigo.

Post la konversacio en la urbodomo la administrantoj tie fotokopiis la plej multon de la montrita materialo. La rezulto de tiu pli ol unuhora intervjuo estis neatendita. Nur tri semajnojn poste, jam hejmveninte al Germanio, mi ricevis personan leteron de la urbestro de Tegueste kune kun la teksto de oficiala urbestrara decido de la 26-a de marto 1993, laŭ kiu estis unuanime aprobita la propono bapti la sennoman avenuon “Calle del Esperanto”. La dato de la bapto ankoraŭ ne estis fiksita. La tutpaĝa teksto de la decido pruvas ke ĉiuj detaloj de la informa materialo transdonitaj estis konsideritaj. La decido emfazas ke Esperanto ne nur estas simbolo, sed praktika rimedo por ebligi universalan interkompreneigon en tioma grado, ke ĝi meritas ĉies subtenon en progresigo kaj praktikado.

Mi daŭrigis letere miajn kontaktojn kun la urbodomo de Tegueste kaj kun la Esperanto-Societo de Tenerifo en La Laguna, mencianto ke la decidita Esperanto-objekto povos esti ĝuste la 950-a en la mondo. Kiam mi denove restadis sur Tenerifo, en februaro 1994, la prezidanto de UEA, prof. d-ro John C. Wells, sendis al mi telefakson kun la peto transdoni al la urbestro kaj la urbestraro de Tegueste “varman gratulon je tiu precize 950-a tiuspeca omaĝo al Esperanto tra la mondo”. Samtempe la prezidanto de UEA petis min, reprezentanti Universalan Esperanto-Asocion dum la oficiala publika inaŭguro de la nova stratnomo.

Sekve, la urbestro de Tegueste, s-ro Vidal Suárez Rodríguez, la 23-an de februaro 1994 organizis akcepton por la prezidanto de la Esperanto-Societo, por du pliaj ĝiaj membroj kaj por mi. Dum la sekvaj pli-ol-unuhoraj interparoladoj la urbestro deklaris, ke deposit kelka tempo en Tegueste estos konstruata nova parka kvartalo sen aŭta trafiko kun transversa, larĝa ĉefstrato, kiu estos la “Calle del Esperanto”; por la ĉefa kruciĝo estas planita monumento honore al d-ro Zamenhof, kaj tiu kruciĝo eventuale ricevos la nomon “Zamenhof-placo”.

Por subteni tiujn projektojn, en aprilo 1994 mi transdonis al la vic-urbestro, Don José Miguel, kolore desegnitajn malnetojn pri la monumento, pri ties tabulo kun la enskribo kaj pri la stratsildoj. La vic-urbestro poste gvidis min tra la estiganta nova kvartalo en tiu rava urbeto tipe tenerifa.



Nun la strato portas nomon: tiun de verko de geniulo: ESPERANTO.

Intertempe, la 18-an de marto 1994, la porturista gazeto "Insel-Zeitung" aperigis mian kvarkolumnan artikolon pri la sekvoj kaj la sukceso de la artikolo el marto 1992, kiam la gazeto raportis ke estas serĉata genio. La titolo de la raporto estis:

"La Insula Gazeto kontribuis: La Genio por Tegueste estas trovita! Baldaŭ la Avenuo nomigos "Esperanto"." Tiel la gazeto prezentiĝis al kelkmilo da germanlingvaj turistoj sur Tenerifo aldone "lecionon" pri la internacia lingvo.

La provizora kulmino, respektive la "unua akto" de tiu aventuro estiĝis de oficiala Esperanto-objekto okazis precize du jarojn post mia vizito al la urbodomo: la 3-an de marto 1995 estis fiksita la grafike belaj stratotabuloj kun la enskribo "Calle Esperanto" sur verda fono kaj kun la kolora blazono de la urbo Tegueste.

Ni esperu al baldaŭa komuna inaŭguro de la kompleta planita aranĝaĵo.

Apartan dankon pro la helpo meritas s-ano Aürelio Solís-Maynar, Sta. Cruz de Tenerife, kaj Francisko José Dávila Dorta, La Laguna.

Situo de la strato: ĉirkaŭ 25 metroj flanken de la urbodomo, direkte al "Calle Calvo Sotelo", maldekstren.

KIEL INAŪGURI ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTON?

Ĉu ne estas impona listo, kiu jen prezentiĝas kun ĉiuj atingeblaj detaloj antaŭ niaj okuloj? Sed tio ne signifas, ke ni nun povus ripozi. Male, ĉiumaniere en nia laboro ni klopođu al publikeco. Unu ebleco surpaſi tian publikan forumon estas la inaŭguro de Zamenhof-strato, de Esperanto-placo aŭ de alia objekto. Tia atingo kostas nenion, tamen varbas plu konstante, kvazaŭ interplektas la respektivran loĝantaron kun la Esperanto-movado. Necesas nur dece sed detale informi la koncernajn urbajn instancojn en senco de peticio, kaj informi multloke ankaŭ per la helpo kaj subteno de la loka gazetaro.


Unu el la plej konvinkaj argumentoj por tio kaj plej taŭga referenco estas tiu ĉi Dokumentaro, ĉar pli facile estas nun varbi per la varbitoj — laŭ la devizo: al ĉiu grupo sian straton! Akiri rezolucion favore al Esperanto-objekto ĉiukaze estas pli facile ol, ni diru, akiri subvencion.

Kaj, finfine, ju pli solena, ju pli bone organizita, ju pli publika estos la inaŭguro, des pli favoraj kaj sukcesaj estos la efikoj. Sur la koncernaj tabuloj nepre indiku nacilingve aldonajn notojn, ekz. “Esperanto — Lingvo internacia” aŭ “D-ro Zamenhof, 1859–1917, Aŭtoro de Esperanto”. Sukceson al ĉiuj, kiuj klopodos pli etendigi tiun liston.

Kaj ne pretervidu informi la komisiiton de UEA pri Zamenhof/Esperanto-Objektoj, kiam fine vi sukcesis en via urbo konvinki la urbestraron nomi straton aŭ placon laŭ Esperanto aŭ Zamenhof, aŭ se vi sukcesis starigi Zamenhof-monumenton aŭ alian objekton. Prof. d-ro Ivo Lapenna skribis al mi okaze de mia unua listo en 1985: “Tiaj objektoj estas ne nur rekonoj al D-ro Zamenhof kaj al la granda valoro de lia genia verko, sed ankaŭ daŭra atentigado pri la ekzisto kaj funkciado de la Internacia Lingvo.”

Hugo Röllinger
Steinstr. 16a
D-97688 Bad Kissingen
Germanio

CENT JAROJ DA ZAMENHOF/ESPERANTO-OBJEKTOJ





*Ankaŭ tiel eblas propagandi Esperanton:
la velboato de d-ro Lothar Mahn, Germanio.*

LITERATURAJ FONTOJ

(krom la dokumentaj fontoj el la korespondado de la aŭtoro)

Alumeto (Kanada Esperanto-Asocio); *Analoj de la esperanta movado en Hispanio* (Zaragoza); *BELO-Bulteno* (Bavara Esperanto-Ligo); *Boletín* (Hispanio); *Budapešta Informilo* (Hungario); *Bulgara Esperantisto*; CED/UEA (ĝis stato de 31-12-1965: Dokumento CED/2-1, A/V/3); *Doktoro kaj Lingvo Esperanto* (Holzhaus), Helsinki 1961; *El Popola Ĉinio*; *Enciklopedio de Esperanto* (Budapest); *Espero Katolika*; *Esperanto* (UEA); *esperanto île-de-france* (Francio); *Esperanto aktuell* (Germana Esperanto-Asocio); *Esperanto Notícias* (Caçapava, Brazilo); *La Eta Gazeto* (Trieste, Italio); *Eventoj* (Budapest, Hungario); *Fenikso* (Argentina Esperanto-Asocio); *Franca Esperantisto*; *Germana Esperanto-Revuo*; *Heroldo de Esperanto*; *Homo kaj Kosmo*; *Informilo Sorokaba* (Brazilo); *Informilo* (Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno); *Jugoslavia Stelo* (Jugoslava Esperanto-Ligo); *Juna Amiko* (Hungario); *Katolika Sento*; *Koncize*; *Kongresa Libro pri la 51a Hispana Kongreso de Esperanto* (1991); *Kulturaj Kajeroj* (Grésillon, Francio); *La Espero* (Seulo, Koreio); *La Migranto*; *La Praktiko*; *Legio de Bona Volo* (São Paulo, Brazilo); *L'esperantiste* (1907, oficiala organo de la Franca movado); *Litova Stelo* (Kaunas, Litovio); *Moskvaj Novaĵoj*; *New York Times*; *Oomoto* (Japanio); *Pilo-Press* (Nürnberg, Germanio); *Revue française d'espéranto*; *Revuo Orienta* (Tokio, Japanio); *Rio Esperantista* (Rio de Janeiro); *SAT-amikaro* (Paris, Francio); *Sennaciulo* (SAT); *Sicilia Nostra* (Kaltagiruni); *Svisa Esperanto-Revuo* (Svisa Esperanto-Societo); *Tereno* (Toowoomba, Aŭstralio); *Verda Stelo* (Manaus, Brazilo).

LISTO DE LA FOTINTOJ

Irena Alijošitute, F. Andreoni, R. Ansorge, Ewa Bondar, Raymond Boré, Thomas Bormann, Nora Caragea, Ruben T. Diaconu, Rudolf Fischer, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, Ludwig Heise, Inga Johanson, Agnes Kronshage, K. kaj S. Langer, *La Praktiko*, Fritz Lautenbach, Gilbert Ledon, Franz Lenze, Lothar Mahn, M. R. Maitzen, Jean Marin, Osvald Nicolaisen, D. Parkinson, Hugo Röllinger, Arlette Schwarz, A. Shrives, Roma Thorsen, Santiago Torné, G. A. Silva Velho, William H. Simcock, Studio "Angélika", *Toowoomba Chronicle*, Josef Vaneček, Haldo Vedin, C. Złobikowski.

BIOGRAFIO DE LA AÜTORO

En 1969 Hugo Röllinger invititis al solena ceremonio en sia hejmurbo Bad Kissingen en Bavario: La urbo solene inaŭguris bronzan tabulon memorigantan ke d-ro Zamenhof ekde 1911 plurfoje restadis por kuracado en tiu urbo. Dum la solena inaŭguro salutparoladis la fondinto de *Heroldo de Esperanto*, Teo Jung, kun kiu Hugo Röllinger konatiĝis en 1928 en Antverpeno, kie li unuafoje partoprenis en Universala Kongreso de Esperanto.

Hugo Röllinger naskiĝis en 1905; en 1921 li fariĝis esperantisto. Du jarojn poste li membrigis en Germana Esperanto-Asocio, en UEA kaj en SAT. Ekde 1926 li gvidis Esperanto-kursojn en sindikataj rondoj; en 1928 li fondis lokan grupon de SAT en sia tiama hejmurbo Ansbach, kie li fariĝis delegito de UEA en 1930. Li restis fidela al la idealoj de la Esperanto-movado, eĉ kiam tio fariĝis dangera, viv-dangera. Hugo Röllinger rakontas:

*En 1933, kiam Hitler ekregis, mi estis membro de la socialdemokrata partio kaj kunfondinta membro de du specife kontraŭ-naziistaj organizaĵoj. Krome mi estis loke konata kiel aktiva esperantisto skribinta multajn artikolojn en gazetoj; mi estis kursgvidanto, membro de GEA kaj SAT, kaj delegito de UEA. Kvankam en 1931, do du jarojn antaŭe, mi estis akirinta ŝtatan ekzamen-ateston kvalifikanta min al ĉiu faka avanciĝo en mia profesio kiel ŝtata oficisto, mi estis eksoficigita el mia profesio kiel (laŭ dekreto de la nazia instanco) "konvinkita kontraŭulo de la nazia movado". Mi do estis senlabora, sen la laŭleĝa subvencio por senlaboruloj, ĉar — laŭ la dekreto — mi estis senlabora "pro propra kulpo". Poste, en februaro 1943, mi ricevis la rekrutigan ordonon. Mi kumportis el la laste ricevita Jarlibro de UEA la paĝojn kun la delegitoj pri la "malamikaj landoj" kaj kaŝis la listojn ĝis la fino de la milito en mia uniformo. Tiumaniere, de 1943 ĝis la militfino en majo 1945, mi povis arangi homajn, samideanajn kontaktojn antinaziajn, kaj en Francio kaj en Nederlando, kvankam ĉia komunikado inter soldatoj kaj enloĝantoj estis grave punenda. Aparte dangera rilate kontaktojn en Nederlando estis la cirkonstanco ke, en la nederlanda urbo Leiden, mi estis komandita en batalionan stabon kaj taskigita kun "aferoj strategie sekretaj" ĉe la ĉefoficiro, kompetenta por dek kompanioj en la bunkraj fortikaĵoj laŭlonge de l' marbordo. Tion ignorante inspiris min en Nederlando la ebleco eĉ de efektiva helpo, ĉar dum la vintro 1944/45 multaj nederlandanoj mortis pro malsato (estis mangataj eĉ la tulipaj bulboj) kaj ĉar miloj da suĉ-infanoj mortis pro manko de lakto (la bovinojn prenis la okupaciantoj); pro tio en miaj mantelaj poŝoj vespere estis nutraĵoj — štelitaj el la garnizona provizejo. Tiel ebligis peri iom da espero — eĉ al kaŝita judino. Multe pli poste mi plene konsciigis pri la fakteto en kazo de hazarda eltrovo de aro da "malamikaj" adresoj en mia uniformo (eble en kazo de vundiĝo) neniu preteksto min estus gardinta kontraŭ verdikto de milita tribunalo: *kulpa pro ŝtatperido dummilita*. Ĉar jam suspekto suficiis... Sed — mi konfidis al "mia felico", kaj subpremis tiajn pensojn.*

Nur post la fino de la milito, en aĝo de jam 40 jaroj, Hugo Röllinger povis komenci karieron en sia profesio, en kiu li avancis ĝis sekciestro de la ŝtata sociala asekuro ĝis sia emeritiĝo en 1967.

Paralele al la profesia kariero Hugo Röllinger fondis kaj gvidis lokan Esperanto-grupon en Bad Kissingen en 1949, kiun li estras ĝis hodiaŭ. Li utiligis siajn Esperanto-kontaktojn por helpi ĝemeligi sian novan hejmuron al Massa en Italio; poste li estis kunfondinto de la ĝemeliĝo inter Bad Kissingen kaj Vernon en Francio.

Ekde 1951, kaj precipe post la pensiigo en 1967, Hugo Röllinger entreprenis stud- kaj fotovojaĝojn al 29 landoj por verki prelegojn pri prahistoriaj kaj kulturhistoriaj temoj, ĉiuj riĉigitaj per propraj lumbildoj. Li ricevis invitojn prelegi en popolaj altlernejoj, kulturaj centroj kaj kongresoj en dek diversaj landoj. Li prelegis ne nur en la germana lingvo kaj Esperanto, sed ankaŭ en la franca kaj itala lingvoj.

Multaj esperantistoj renkontis la preleganton Röllinger en la Esperanto-kastelo Grésillon (Francio), kie dum 15 someroj li prezentiĝis siajn prelegojn. En 1970 aldoniĝis la hispana lingvo al la repertuaro de liaj preleg-lingvoj, post kiam prof. Juan Régulo-Pérez estis invitinta lin al Tenerifo. Hugo Röllinger prezentiĝis prelegon kun lumbildo en la universitato de La Laguna pri la prahistoria homo kaj la naskiĝo de arto. Depost tiu, sur Tenerifo oni aprezis tiun talenton kaj regule invitis lin prelegi. La dankon pro tio reprezentas honorigo per la bronza Zamenhof-medalo dum la hispana Esperanto-kongreso en 1992. Samjare Germana Esperanto-Asocio aljuĝis al Röllinger la meriton de honora membreco. En somero 1995 ĉiujn meritojn kronis la Komitato de UEA, kiu dum la 80-a Universala Kongreso de Esperanto en Tampere, Finnlando, elektis lin Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio.

La honorigoj precipe estis dankoj pro la senlaca laboro por dokumenti la Zamenhof/Esperanto-Objektojn ĉie en la mondo, kies kompliladon Röllinger komencis en 1965. Tri jardekojn poste aperas tiu ĉi Dokumentaro, frukto de miloj da korespondadoj, centoj da instigoj inaŭguri novajn Zamenhof/Esperanto-Objektojn — ZEOjn — ĉie sur la globo. Jen, 1044 objektoj en 54 landoj estas la fiera bilanco — 1044 stratoj, placoj, monumentoj kaj tabuloj ĉie en la mondo nur pri Zamenhof kaj Esperanto: cifero inda je mencio en la Libro de Rekordoj de Guinness!



Hugo Röllinger

En 1896 eknavigis la ŝipo Esperanto. En postaj jardekoj sekvis en ĝia disondo aliaj ZEOj (Zamenhof/Esperanto-objektoj) plej diversaj: stratoj, avenuoj, monumentoj, placoj, parkoj, pontoj, kulturcentroj, bustoj, tabuloj. Aliĝis al ili eĉ asteroidoj en la senfinaj vastoj de la kosmo.

Dum 30 jaroj Hugo Röllinger serĉis kaj dokumentis ZEOjn. Necesis ne nur persisto kaj zorgemo sed ofte ankaŭ detektiva sagaco kaj bonŝanco por malkovri ilin kaj povi nun prezenti la abundan rikolton de la jarcento 1896-1996: 1044 ZEOj en 54 landoj de la 5 kontinentoj. Rezultis fascina libro, kiu estas multe pli ol faktokolekto: la aŭtoro prave nomas ĝin “imaga vojaĝo tra Esperantujo”. Dum tiu vojaĝo aventuroj ne mankas.

“Omaĝo al pioniroj min komisiis”, skribis Hugo Röllinger iam al UEA. MONUMENTE PRI ESPERANTO estas lia monumento al ĉiuj, kies iniciatemon kaj agemon ni dankas pro tiom da firmaj formoj de publika rekono al Esperanto. Samtempe ĝi estas instigo al aliaj, por ke estonta eldono de tiu ĉi dokumentaro estu eĉ pli ampleksa.

